

OMAGĜE al Kálmán Kalocsay

El Abaújszántó ĝis la Esperanta Parnaso

KVINA VOLUMO

ĈAPITRO 11 LINGVISTO KAJ GRAMATIKISTO

...
*mi jam tre frostus, se mi starus nuda
antŭ la mondo — jes, mi iĝis pruda;
tial, por kovri nudon de liriko
mi vestis min per dika gramatiko,*¹³⁷
...

11.1 ENKONDUKO

G. Waringhien en 1931 skribis al Kalocsay:

"... mi ĉiam pensis, ke unue oni devas zorge forĝi la laborilojn, vortaron kaj gramatikon, kaj mi tion faris kaj faras... tiaj verkoj estas necesaj kaj utilaj, sed ne kreskigas la renomon de la verkisto: en la domo de Esperanto, mi fosas la kavojn kaj masonas la brikojn, dum vi skulptas la kariatidojn kaj frizon; per nia kunlaboro, fariĝos la loĝejo palaco...".

Fakte Kalocsay komencis sian Esperantan karieron kiel poeto, tradukanto, sed li akiris nomon ankaŭ kiel gramatikisto: lingvo-komitatano ekde 1922 ĝis 1939, akademiano de 1949. La nomo de la gramatikisto Kalocsay baldaŭ fariĝis fama kaj misfama, ĉar li klopodis laŭeble solvi dubajn punktojn en la gramatiko kaj pluraj liaj tezoj kaŭzis konfliktojn inter la "pacemaj" samideanoj.

La diskuto pri diversaj gramatikaj demandoj estas akcesora fenomeno de la Zamenhofa lingvo. La *neologismo*, la demando pri la ĝusta uzado de la *pasivaj participoj* (Ata/lta), kaj la sistemo de la *Esperanta vortfarado* (vortkunmeto) estis la ĉefaj kolizi-punktoj, kiuj estigis tiajn fulmotondrojn, kies bruo eĥis dise en Esperantujo. Ĉi tiu ĉapitro okupiĝas iom pli detale pri tiuj ŝtormovekaj polemikoj, kies partoprenanto — kaj ankaŭ plukirlanto — estis Kalocsay.

Antcipe mi petas indulgon de la oponentoj de Kalocsay, ke mi tuŝas nur skize iliajn teoriojn. Sekve, ne estus dece ĉe mallonga citaĵo prezenti ilin laŭnome. Krome, bonvolu pripensi: finfine ĉi tiu volumo omaĝas al Kálmán Kalocsay.

La sekvaj kompilaĵoj: artikoloj, citaĵoj kaj bibliografiaj indikoj celas: por la junaj, novaj — probable ĉi-rilate malpli orientitaj — samideanoj kaj al la sekvaj generacioj doni informojn kaj prezenti la lingvistan-gramatikistan agadon de Kálmán Kalocsay.

137 *Letero al Julio Baghy*. En: ARGENTA DUOPO p. 14.

11.2 KALOCSAY, LA NEOLOGO

"Vorto, enkondukita en iun lingvon, kie ĝi ĝis tiam ne estis uzata."

Jen la difino laŭ PIV, al kiu oni povas aldoni parenteze: unu el la ĉefaj diskutpunktoj inter la adeptoj de Esperanto.

Vere, la neologisma problemo estas samaĝa kun la lingvo. La ĉi-rilataj polemikoj plenigus dikajn volumojn, kaj estus malfacile diri pri ĝi io ajn novan, ĝis nun ne eksplikitan argumenton por kaj kontraŭ. El la historio de neolog-milito prezenti la epokon, en kiu batalis ankaŭ Kalocsay, ŝajnas esti plej konvena atesto citi el la diskut-artikoloj, atakaj skribaĵoj, pamfletoj, grandnombre troveblaj en la tiutempaj revuoj.

Antaŭ ol tion fari ni iome orientu nin pri la afero.

Kalocsay grupigas la antipodojn jene:

"... la esperantistojn oni povas dividi en du grupojn, en propagandistojn kaj literaturistojn.

La propagandisto volas facilan Esperanton, kiun li povas verŝi rapide, per tute eta funelo, en la kapon de ĉiu homo. Li estus plej feliĉa, se la lingvo konsistus el ducent vortoj, se oni povus skribi sur poŝtkarton la tutan gramatikon, kaj la tutan vortaron, kun la Himno. Li estus tre kontenta, se post sessemajna kurso ĉiu parolus flue kaj komprenus sen vortaro la kolektitajn verkojn de Shakespeare, Dickens, Wells kaj Shaw.

La literaturisto volas riĉan lingvon, volas havi apartan vorton por ĉiu vorto de sia nacia lingvo, apartan vorton por ĉiu nuanco, laŭeble radikvorton, ĉar la vortojn tro derivitajn kaj kunmetitajn li sentas artefaritaj, malfortaj, senkoloraj. La poeto volas multajn, tre multajn vortojn, por raketi per ili, por trovi per ili freŝajn, neuzitajn rimojn. La poemtradukisto abomenas la kunmetaĵojn, ĉar ili estas tro longaj, malhelpas lin en lia vetkuro por mallongo. Ili efektive havas sopiron je la tuta indogermana vort-trezoro kaj amare envias la kvardek mil vortojn de la feliĉa Shakaspeare..."¹³⁸

*

La ĝeneraliga difino: neologoj kaj antineologoj ŝajnigas, ke en la batalkampo luktas du tendaroj. Fakte la rifuzantoj de neologismoj — fundamentistoj, konservativuloj, simplistoj, puristoj — reprezentas diversajn starpunktojn koncerne la akcepteblecon de la novaj vortoj. Estus do maljuste kaj malĝuste verŝi ilin en la saman barelon. Ekzemple apenaŭ troviĝas jam tiom da fanatikuloj, kiuj rigore ekstermus sendistinge ĉiujn vortojn ne troveblajn en la Fundamento. Ĝuste tial eksmodiĝis ankaŭ la nomigo: *ortodokso*.

La antineologoj plejparte ne kontraŭas novajn vortojn necesajn por esprimi novajn ideojn, novajn terminojn. Ili rigardas per oblikvaj okuloj la "fremdajn", kiuj servas stilajn celojn, opiniante, ke tiuj superflujaj vortoj kvazaŭ balaste malfaciligas la lingvolernadon. Luj el inter ili batalas nur kontraŭ vortoj ne kuŝantaj en PIV, (kiun ili taksas kiel oficialan vortaron), aliaj ne protestas kontraŭ la uzo de la internaciaj vortoj, eĉ se ili ne troviĝas en la Universala Vortaro. Ne estas konsento rilate la akcepton de la unuopaj vortoj: unu aprobas tiujn ĉi vortojn, la alia tiujn, finfine preskaŭ ĉiuj novaj vortoj estas akceptitaj.

Kvankam la murmuroj kontraŭ la neologismoj aŭdiĝis jam en la unuaj jaroj de la lingvo, tamen la diskutoj ankoraŭ ne akriĝis ĝis batalo. La senindulga lukto komenciĝis post la morto de Zamenhof. En la unua periodo la novaj vortoj enkondukitaj aŭ uze sankciitaj de Zamenhof mem — estis akceptitaj sen grandaj kontraŭstaroj. La aŭtoritato de Zamenhof malhelpis, ke oni kontraŭbatalu liajn vortriĉigajn iniciatojn. Krome, tiam ankoraŭ estis

evidente por ĉiuj, ke la lingvo ne estas tute matura. Do paralele kun la nepre necesaj vortoj oni toleris ankaŭ la vortojn por artaj bezonoj.

Kiam Kalocsay ekagis literature, jam impetis la neologmilito. Ankaŭ por la plumo de la poeto Kalocsay la tiama vorttrezoro, kompare al la naciaj lingvoj, ŝajnis liliputa. Li sentis la bezonon pliriĉigi la vortostokon kaj li manipuladis per neologismoj. Pro tio lin ofte trafis pli-malpli akra kritiko. Oni riproĉis lin, ke li malutilas Esperanton, kaj Kalocsay baldaŭ estis diskriita kiel *danĝera akuŝisto de vortkohorto*, kiu ĵongladis per novaj vortoj por propra plezuro kaj gloro. Kompreneble ĉi tiu determino estis ne nur erara, sed ankaŭ ege maljusta. Lian ĉi-rilatan agadon plej ĝuste resumis W. Auld:

"... multaj homoj ricevis la impreson, ke la koncernan poezian stokon efektive kreis en Esperanto la diablo Kalocsay – eventuale en kunlaboro kun tiu alia Mefisto, Waringhien. Tio ne estas vera. Ilia granda 'kulpo' estis kolekti la stokon kaj ĝin listigi en la PARNASA GVIDLIBRO..."¹³⁹

Tamen antaŭ la vasta publiko Kalocsay devis porti ĝis la morto (eble eĉ poste) surfrunte la brulstampon: *obstina vortfabrikisto; fanatika neologemulo; facilanima vortkreanto; obsedanto de neologismanio; vort-imperialisto; eĉ Idisto* — anstataŭ la pli justa kaj trafa titolo (ricevita de Saint Jules Zee): *advokato de neologismoj*.¹⁴⁰

Foliumante la tiutempajn Esperantajn revuojn aperas antaŭ niaj okuloj mozaikbildoj pri la batalejo, pri la luktantaj herooj, kiujn esence gvidis honesta intenco: ama zorgo pri Esperanto.

138 En: LINGVO, STILO, FORMO p. 56.

139 En: Esperanto 1962/65.

140 En: ARGËNTA DUOPO p. 129.

11.2.1 Vortduelo inter Baghy kaj Kalocsay

Iom strange, ke la plej impetan atakaron kontraŭ la neologemo Kalocsay ekirigis la samnaciono, poetofrato Julio Baghy. Kaj estas eĉ pli stranga, sed ĝojiga, ke malgraŭ ĉiu "kverelo" ilia amikeco (eĉ se ĝi suferis iom da difekto) ne disŝiriĝis.

La duelantoj

Karikaturo de St. Barta.
Repr. el ARGENTA DUOPO.

Pri la komenco kaj kaŭzo de la duelo rakontas Baghy:¹⁴¹

...En 1920 en Siberio mi ricevis gazeton, en kiu mi trovis hungaran poemon tradukitan de li. Tiu traduko ravis min kaj mi ekkriis: "Jen fine granda talento!" Tamen mi konfesas ne nur por esti sincera, sed por montri la elirpunkton de niaj kvereloj, ke en tiu vere arta kreaĵo troviĝis unu sola vorteto "forlasintus", kiu skurĝis mian pipran temperamenton. Tiu vorteto restis la neforigebla dorneto, la karakteriza diferenco inter niaj vojoj...

Do laŭ la konfeso de Baghy la neologemo de Kalocsay afliktis lin jam en 1920. Pri ilia publika diskuto ni havas dokumentojn nur ekde 1925. En *Literatura Mondo* Kopar eksplikis sian starpunkton pri la neologismo, pri la bezono de poezia fakvortaro.¹⁴²

Baghy perletere kun vervaj vortoj refutis la argumentadon de Kalocsay.

... Do estontaj esperantistoj devos lerni:

a) vortaron por la ĉiutaga uzo;

b) por la poezio (por kompreni la eternajn pensojn de "mondforaj" poetoj), kaj

c) pli-malplie teknikan.

Vivu la simpleco! Esprimoj uzeblij nur en poezio ne posedas vivrajton en nia lingvo. Ili estas balasto forĵetinda... Poetoj, al kiuj la nuancoj de Esperanto ne sufiĉas, kiuj inter cent

nepre bezonos la centunuan, serĉu nacilingvon por ili pli taŭgan. Nia afero povos facile rezigni la de ili alportatan "kolorvaloron", la "esprimkapablecon divinan"!

Al la riproĉaj vortoj respondis Kopar:

... Vi montras al mi pardonon de Esperantujo. Sed pripensu, mi ne estas la sola. Grabowski, la patro de nia poezio, estis ankaŭ patro de tre multaj novaj vortoj. Ĉu ankaŭ lin vi metas ekster la pardonon? Nu, se kun li kaj mi venos ĉiuj, kiuj same pensas kiel li kaj mi, ne tro multan ĝojon vi havos el la poezio, kiu restos post la elfeto de ĉiu tiuj "mondforaj poetoj..."¹⁴³

La disputo inter Baghy kaj Kalocsay vastterene incitis la luktemon de la antipodoj. Artikoloj, pamfletoj atakis la neologojn klopodante kompromiti ilin.

Oleo al la fajro

1932. Aperas la PARNASA GVIDLIBRO, kies *Poezia Fakovortaro* enhavas 602 vortojn netroveblajn en la SAT-vortaro. Unu el la puristoj indigne protestis:

... Oni povus eble toleri tiun amasan invadon de neologismoj, se per ĝi la afero estus finita unufoje por ĉiam. Sed tio ne estas verŝajna, ĉar la nuancoj estas sennombraj kaj la longaj vortoj ankaŭ estas troveblaj ankoraŭ amase. Kaj venos la literaturistoj de la plej diversaj nacioj — kial ne? Ĉu ili ne havas la saman rajton? — kaj ili "pliriĉigos" la lingvon per siaj specialaj nuancoj. Kie estos la fino?... Resume: nek la penso pri libereco de l' poeto, nek la atestoj de Grabowski aŭ de aliaj, nek la monro al lingva instinkto de l' publiko (?) povas trankviligi en mi la timon, ke jen danĝero minacas al nia lingvo..."¹⁴⁴

La vortostoko de *Poezia Fakovortaro* ege ekscitis ankaŭ la galon de Baghy. Sub titolo *Ĉu Ido aŭ Poligloto? Ne! Desperanto!* li tuj verkis poemon, konsistantan el sesdek kvar versoj, kie li amasigis cent tridek neologismojn registritajn en la *Fakovortaro*. Jen la lasta strofo de la parodio.

*Jes! Ni ne negas, ni rigas veselon,
ostentos voston de nia Pegaz'.
Post lanĉo, Junaj al poŭpo koheru;
Olduloj plingu k ek al Parnas'!
Mi ne gaskonas. La sun' de l' fortreso,
la NeTUŝEBLA LINGVA FUNDAMENT',
descendos balde k estos kaputa,
la rond' gemuta de l' notora gent'.
Futuron forcas ni. El la prizono
eskapis ni por pluki kun tenac';
la POEZIA FAKVORTARO servu
pli plena kripo kiel nur — prefac'.
Ni temerara agresas! Erudu!
Olduloj tramplu, knaku pro rankor'!
Konfrontas ni parcimonan paseon
k prozan nunon spite al rumor'.
Nin ne molestas ilia klamado;
softiĝos ĝi pro nia desapont':
La novaj Leau, Couturat k Beaufront.
La prominentaj lucidaj ĝenioj*

*jam levas cenotafon por vivant';
la kurtan moton ni konas de jaroj:
"Hej, vivu IDO! Bas, bas, ESPERANT"!*

La poemon kompletigis Baghy per proza teksto:

... ĉu vi konsentas pri tia perforta evoluigo kaj IDO-igo de nia lingvo? Ne miru do, se lastatempe multaj batalantoj forlasis la movadon kaj ne miru, se vi konstatos, ke Esperanto fariĝis la plej malfacila lingvo el la lingvoj. La literaturo, kies ĉefa tasko estus prilabori la lingvon el ĝiaj naturaj elementoj kaj gardi la unuecon, uvrís aŭ apertis, aŭ simple malfermis la vazistason (?) por la lingva anarĥio. Jen unu el la principaj kaŭzoj, kiu devigis min rezigni pri la ĉefredaktora titolo de Literatura Mondo.¹⁴⁵

En la sama numero de la revuo rebatas Kalocsay:

Kara Baghy!

...Kaj mi devas korekti tion, ke la troo de neologismoj estis la sole dirinda principa kaŭzo, kiu vin devigis abdiki pri la ĉefredaktoreco. Estas vere, ke vi kelkfoje parolis kontraŭ la neologismoj, sed ni, nia kulpo, ne konsideris tion tro serioze, ĉar ankaŭ vi mem ne malofte uzis novajn vortojn en viaj verkoj, do ni opiniis, ke vi apartenas al tiu ne malofta speco de esp-aj verkistoj, kiuj teorie kondamnas, praktike uzas neologajn vortojn... Kaj neniam vi starigis nin antaŭ la alternativon: "aŭ mi, aŭ la neologismemo"...

Ni devas do diri, ke la principaj kaŭzoj de via abdiko estis aliaj. Mi ne malkaŝos ĉi tiujn kaŭzojn, ĉar tio estas viaj tasko kaj rajto, ne la miaj...

Mi tre bedaŭras, ke mi devis vin tiel senigi la plej populara kaj taktike plej oportuna motivo de via abdiko... Fakte estas, ke via unua decida malaprobo kontraŭ la neologismoj venis al ni kun ses aliaj kaŭzoj de abdiko, en via abdika letero.

Sed, mi neniam ŝatis personaĵojn, precipe estus malagrabra kvereli kun vi, al kiu mi sentas ankaŭ nun amon kaj amikecon. Mi do finas ĉi tiun senbenan disputon....

Post ĉi tiuj enkondukaj vortoj Kalocsay detale defendas, motivas kaj argumentas la poezian vortprovizon. Fine li diras:

Mi ne estas kaj neniam estis blinda fanatikulo de miaj propraj argumentoj. Tre volonte mi revizias miajn opiniojn, se oni konvinkas min pri ilia malĝusteco. Sed tion oni devas fari per argumentado, kaj ne per pli-malpli sukcesaj mokoĵ, aŭtoritata Jupitra tondrado, komparoj al Beaufront ktp. Mi kredas, ke mi sufiĉe laboris por la lingvo, ke oni ne dubu pri miaj honestaj intencoj. La plej belajn jarojn de mia vivo mi oferis por Esperanto, en ĝi kuŝas mia tuta vivoverko, ĝia neniigo estus la neniigo de ĉio kion mi plej fervore faris dum mia vivo. Estas tute ridinde supozi, ke mi volus malutili al io, al kio mi estas ligita kun mia tuta koro.

Karaj legantoj, kara Baghy! Bonvolu atente konsideri kion mi skribis. Bonvolu montri al mi la malĝustajn flankojn de mia rezonado. Precipe vi, kara Baghy, al kiu min ligas tiom da belaj memoroj de kuna laboro, bonvolu nun, unufoje juĝi tute senpasie. En ĉi tiu espero mi restas, malgraŭ ĉio, tre amika kaj sincera via:

K. Kalocsay

Jen respondo de Baghy:

Kara Kalocsay,

la letero al la legantoj kaj al mi devigas min respondi publike... do personaĵoj. Sentakte vi agis aludante pri ili. Sentakte, sed taktike... Por eviti la eblecon de miskompreno mi konfesas, ke la akriĝon de la situacio vi nek iniciatis, nek akcelis, sed ankaŭ ne malhelpis. Pro via senpasia neŭtraleco mi kore dankas vin, ĉar ĝi faciligas la foriron de tiu gazeto, kies fondintoj ni ambaŭ estas, kaj por kiu ankaŭ mi oferis tiom, kiom vi, se ne pli, konsiderante miajn vivcirkonstancojn. Do mi ne parolas pri la personaj motivoj, kiuj estis kaj restis. Por vi sufiĉas scii, ke kun plena seniluziigo mi forlasis la Redaktan Komitaton kaj la tutan entreprenon de LM.

Nun pri la atako kaj via protesto kontraŭ la 130 novaj vortoj, uzitaj en mia poemo. Mi sendis ĝin donante al vi plenan rifuzrajton por la publikigo... Tamen vi publikigiŝ ĝin, verŝajne pro tio, ĉar vi estas mia amiko kaj senpasia neŭtralulo... Mi miras pri via protesto. Ĉu mi ne laŭ via konsilo uzis tiujn 130 novajn vortojn, proponitajn de vi por la poezio? Mi adaptis ilin en la poemo. La PARNASA GVIDLIBRO estas ja eldonaĵo de LM kaj unu el ĝiaj verkintoj estas la ĉefredaktoro de la revuo. Ĉio ĉi rajtigas min al la supozo, ke vi ne ekstermos viajn proprajn infanojn en tiu presorgano, kies gvidanto vi mem estas. Pardonu mi ne scii, ke uzi ilin estas via privilegio...

Kaj Baghy (same kiel Kalocsay) daŭrigas sian leteron per detala argumentado kaj finas ĝin jene:

Kaj nun, kara Kalocsay, sen "malgraŭ ĉio" mi kore deziras al vi, ke en la estonteco neniam vi sentu la pravecon de la motivoj, kiu igis min decidi por forlaso de LM. Mi deziras sukceson al via granda laboro, ĉar mi scias, kion signifas por vi nia lingvokulturado. Ĉu vi scias kial? Ĉar en mi estas la riproĉata pasio al la lingvo, kiu ankaŭ al mi donis vivenhavon. Mi tre bedaŭras, ke ĝi perdis multon ĉe LM. Nu, sed rekompence mi ricevis almenaŭ utilan sperton. Ankaŭ ĝi valoras iom.

*Esprimante la esperon, ke vi ne permesas fari kverelojn pro personaj aferoj el LM kaj respektante en vi la grandtalentan kolegon, restas amike via:*¹⁴⁶

Julio Baghy

En la sama numero de la revuo rezonas Kalocsay.

Kara Baghy!

Plene mi aprobas vian pledon, ke ni ne faru kverelojn el LM. Sed bedaŭrinde, samtempe kun ĉi tiu pledo vi donis ankaŭ flankbatojn, kiuj min devigas respondi...

Vi diras min sentakta kaj taktika, ĉar mi aludis viajn personajn aferojn. Ĉu vi ne mem devigis min por tio? Eksiĝinte pro personaj kaŭzoj, vi deklaris, ke vi eksiĝas ne volonte ŝajni kunkulpulo en mia idismo kaj brofonteco. Ĉi tio ne estas taktiko?

Via poemo estas karikaturo. Bone, mi komprenas ŝercojn. Sed la enhavo kaj la postparolo estis krude serioza atako...

Pri aliaj kelkaj punktoj eble mi trovos okazon respondi al vi aliloke kaj alitempe. Ĝis tiam mi restas sincere via

K. Kalocsay

141 En: ARGENTA DUOPO p. 17.

142 En: LM 1925/januario, posta interna kovrilpaĝo. Leterkesto.

143 En: LM 1925/aprilo, posta interna kovrilpaĝo. Leterkesto.

144 En: LM 1932/192.

145 En: LM 1933/14.

146 En: LM 1933/40-41.

11.2.2 La Pirato sturmas

La vortduelo estis bonveniga temo por la plumo de satiristo, R. Schwartz:

Ping Baghy!
Pong Kalocsay!

...Kiam mi aŭdis pri la disiĝo de la "Dioskura paro Baghy-Kalocsay" pri ilia diskuto koncerne la poezian fakvortaron, nia pirata koro eksaltis kaj ekkriis grenkampe¹⁴⁷: nun ni vidos honestan sporton!

Jes, kukon — kiel diras niaj germanaj samideanoj. Oni ne lojale trompis nin. En la vastaj kolonoj de *Literatura Mondo* la disiĝintaj fratoj ĝentile interŝanĝas komplimentojn. Trempinte sian plumon en sukeran akvon Kalocsay certigas al la kara Baghy ke ankoraŭ nun li sentas por li amon kaj amikecon, dum la kara Baghy susuras amema al la kara kolego, ke "li restas amikece lia!" Ni prave supozas, ke la du mielecaj kontraŭuloj uzis por sia privata korespondado la kolonojn de *Literatura Mondo* nur, ĉar ili ne konas siajn reciprokajn adresojn...

Niaflanke ni povas nur bedaŭri tian hortindan malbatalemon...¹⁴⁸

*

Sekvas pirate redaktitaj *Publikaj Leteroj* inter *Atrov Orkas* (Baghy) kaj *Genio Funel* (Kalocsay). Pri tiu ĉi satiro aludas Kalocsay en la poemo verkita por la 25-jara jubileo de ilia esperantistigoj:

*Letero al Julio Baghy*¹⁴⁹

*Kara Baghy! — ne bone mi komencas!
vi kredos, ke diskuti mi intencas,
kiel en temp' iama ni "ping-pongis"
laŭ Schwartz, kiu protestis, ke ni ĵonglis
per ĝentilaĵoj kaj ne drasis brave
unu la alian, pugne, vipe, glave.*

...

*

La disputo pri la neologismo estas neelĉerpebla fonto por la plumo de R. Schwartz.

El Okcidento Luks'!

La neologisma demando neniam ekscitis min. Se iu ĉielproksima poeto, ŝvebante du mil futojn super la realaĵo de l' terpomkampoj, nepre deziras susuri al anĝeloj, muzoj kaj kio la nedifineblajn sentojn de sia labirinta animo, nu bone, li elektu — se necesas, eĉ kreu — por tiu ĉi celo taŭgan esprimilon. Kial tio ĝenus min? Nur tiam mi protestus, se iu aŭtoritato pretendus devigi min partopreni tien stelregionan konversacion... neniuj devigas min traŝviti la tutan INFERON de Kalocsay. Do kial vi plendas? Kaj, sincere, kiom da esperantistoj kutimas legi esperantajn verkojn? La granda armeo, kies ĉefa tasko estas nur aldoni kelkajn nulojn al la statistikaj ciferoj, povas senemocie kovri sian literaturbezoon per legado de prospektoj kaj gvidfolioj... Niaj orientaj amikoj tute prave asertas, ke la nove kreitaj vortoj tro evidente favoras la Okcidentanojn. Tial la neologismojn elkovitajn en Eŭropo ili konsideras nenecesa lukso kaj dumkongreso ili verkis tre energian cirkuleron kontraŭ la delikatsencaj nuancemuloj.

Kaj post pripenso mi alvenis al ĉi tiu dekreto: Ĉar Esperanto estas lingvo neŭtrala, ĝi ne

prezentu pli da facilaĵoj al unu nacio ol la alia. Sekve, nova vorto rajtos de nun eniri Esperanton nur, se ĝi havas absolute nenion komunan kun iu ekzistanta lingvo. Ĉu ne?¹⁵⁰

*

La gazeto plu amuzas siajn legantojn, ĉi-foje per anonco, sur *La paĝo de l' Komerco*.¹⁵¹

147 Aludo pri la juneca "peko" de S. Grenkamp: LA KRIOJ de KORO.

148 En: La Pirato 1933:6; repr. en: ARĜENTA DUOPO p. 186-187.

149 En: ARĜENTA DUOPO p. 11.

150 En: La Pirato 1933:7, p. 98.

151 En: La Pirato 1933: oktobro.

11.2.3 "Danĝera vojo"

Sub titolo *Danĝera Vojo* en artikolserio Baghy atakas la *Poezian Fakvortaron, la neologismojn, kiu kondukas la ŝipon de Esperanto al "danĝeraj rifoj"*.¹⁵²

Tiun artikolserion aludis Kalocsay dediĉante al Baghy honorekzempleron el la tiam aperinta traduko de la INFERO:¹⁵³

Sendante ĉi volumon al Julio
Baghy, mi timas, ke ĝin el la mano
li ĵetos grumble, kun melankolio,
kaj anatemos li pri Kolomano
Kalocsay pro l' vortmanio aĉa,
infektanta la lingvon per malsano.
Kaj eble vidus li kun sento plaĉa,
se pendus mi pro l' krimoj, vekriante,
el Lucifera buŝo sangokraĉa.
Jen tamen, kiun mi tridekkvar-kante
postkantis laŭ la vizio nigra,
kiun konsternis diris al ni Dante:
dum sekvis mi, senlace kaj senpigre,
sur penaj krutoj de la Loko Dura,
mian Poeton en la vojo migra,
kaj malgraŭ ĉiu stumblo, tremo krura,
al steloj, kiuj surĉiele tendas,
mi kun li venis el la Val' Terura:
jen, kia ajn akcepto ĝin atendas,
ĉu tret' malŝata, ĉu rekona ĝojo,
mi ĝin amike dediĉante sendas
vojaĝdonacon el "Danĝera Vojo".

En la sama jaro nova verko aperas: HUNGARA ANTOLOGIO. Denove ekflamas la batalo. En en la 3-a numero de *Hungara Heroldo* (oficiala organo de HES) aperis recenco pri la volumo. La redaktoro de la gazeto — kiel li asertis — pro lokmanko iomete mallongigis la artikolon, forlasinte la superflujajn ĝentilaĵojn. Do la recenzo iĝis iom akratona.

La *Bibliografia Gazeto* refutis la pikadon de la recenzanto.¹⁵⁴

La redaktoro de HH, d-ro Jozefo Takács, sub titolo *La literaturaj Donkihotoj* rebatas jene: "... la mondfama (nome LiteraturMond-fama) kritikisto sentis necese ataki min. Mi pikadis kaj pikados nur frenezajn neologismojn. Sed tion faras ĉiu normalpensa esperantisto. Ŝajne vana estas la klopodo konvinki la Donkihotojn. Nur energia bojkoto kontraŭ neologismaj verkoj helpos resanigi la neologisman febron."

Kaj li plue defendas sian recenziston:

"...Li havas pli da merito rilate la disvastigon de Esperanto ol la tuta fiera redaktorado de *Literatura Mondo*, kiu arogas al si la rajton de supera tribunalo en literaturaj demandoj... Se la literaturaj donkihotoj volas kapti la radon de vivmuelilo, nur ilia kapo rompiĝos..."¹⁵⁵

*

La komitatkunsido de HES opiniis malutila daŭrigi la senbenan ofendotonan disputadon kaj akceptis rezolucion, laŭ kiu la redaktoro de HH ne aperigu plu atakajn artikolojn.

La redaktoro taksis la rezolucion de la komitatkunsido kiel influon de LM kaj apelaciis al la ĝenerala kunsido, kiu unuvoĉe konsentis la rezolucion. La redaktoro ne povis submeti sin al la decido kaj abdikis sian postenon.

*

Kaj plue inundas riproĉoj kontraŭ la vortriĉigo kaj kontraŭ ties centra figuro: Kalocsay.

Japana rezolucio

La XXI-a Japana Esperanto-Kongreso la 3-an de novembro 1933 akceptas rezolucion, kiu interalie deklaras:

La XXI-a Japana Esperanto-Kongreso atentigas pri la reformemo kaj troa neologismemo de "modernaj" esperantistoj, kiuj konstante malfaciligas nian internacian lingvon. Tre ofte oni ne atentigas nin orientojn ĉe la enkonduko de "internaciaj vortoj", kiuj ne estas komprenataj en Oriento, same kiel en multaj Eŭropaj landoj... Neologismoj pro bezono de poemfabrikado estas nenio alia ol degenerado de la arta poezio; plie, en Esperanto ĝi signifas rekte danĝeran ludon kontraŭ la fundamento...

*

La rezolucio de la japana kongreso – sugestita ankaŭ fare de Baghy kaj Jozefo Major direktiĝis unuavice kontraŭ Kalocsay. Li estis tiu ĉefpoeto, kiu degenerigas la lingvon kaj ties poezion.

*

152 En: Oomoto Internacia 1933:2-3, 4, 5, 6; repr. en: Lingva Kritiko 1933:14-15-16.

153 La poem-dediĉon de Kalocsay kaj la tiaman neolog-militon klarigas A. Csiszár en : VERSOJN p. 55-60.

154 Eldono de Literatura Mondo 1933:4, p. 53.

155 En: Hungara Heroldo 1934:1, p. 3-4.

11.2.4 "Donacon mi volis doni al la esperantistaro..."

Post la japana rezolucio Georgo Karczag intervjuis Kolomanon Kalocsay pri la afero.

Kalocsay tiris siajn ŝultrojn kaj diris:

*Hm. Oni povas diskuti kun unu homo, kun kelkaj homoj, sed kun amaso? Amaso ja havas nerefuteblan argumenton: voĉon, krian voĉon, kiu subpremas la parolon de la kompatinda diskutanto. Mi ne emas superkriegi amason. Poste mi laciĝis plu argumenti. Miajn argumentojn oni nomis "sofismoj". Jen la ĉiopova amas-argumento. Mi imagas, kiel krias centoj kaj centoj: "sofismoj, sofismoj!". Kion mi povus fari kontraŭ ili eĉ la plej trafa rezonado, plej brila ekzemplo. Ili ne aŭdus tion pro sia propra voĉo. Kaj vane mi starus sur miaj dektri libroj: ili ne atingas la alton de la multe pli facile ĉarpentebla popoloratora estrado. Ilin, plejparte tradukojn de ĉefverkoj, kiu postulis de mi kvazaŭ asketan memkoncentriĝon dum multaj jaroj, oni simple nomis "degenerado de la arto poezia". **Donacon mi volis doni al la esperantistaro, kaj jen, ties grava parto oficiale kaj unuanime kraĉis sur ĝin...***

Diskutojn mi ĉiam amis. Sed nun ekscitis laŭtkrian ĥoron, por ke ĝi sufoku mian voĉon, tondrante: "Sofisto, degeneriganto, modernulo, poeto, vort-imperialisto!" Kaj eĥos ĉiuj gazetoj, aplaŭdos ĉiuj societoj. Oni jam parolas pri bojkoto. Mi ŝtopas la orelojn kaj rifuĝas.

La intervjuanto amare rimarkis:

"Mi kredas, ke Kalocsay estas prava, kiam li ne volas diskuti. Li ja eksplikis sian vidpunkton klare en pluraj artikoloj, kaj kun senkompara verve en sia *Arto Poetika*. Al tiuj eksplikoj vere estas malfacile aldoni iom..."¹⁵⁶

*

Pri tiu atako el Japanio Kalocsay diris post multaj jaroj:

En la ekstrema lukto de neologoj kaj simplistoj mi estis la plej ĉefa celtabulo de tiuj lastaj, ĉar mi prenis laŭvorte la konsilon de Zamenhof, ke la lingvon on devas riĉigi. Okazis eĉ kampanjo por anatemi min — feliĉe oni ne povis ekbruligi ŝtiparon sub mi. Tiel mi iĝis fama kaj misfama..."¹⁵⁷

Pri la japana rezolucio aliajn vortojn de Kalocsay gardas sonbendo registrita de t. Hugimoto en 1969. Laŭ tiu sonbendo la AMO-Akademio en sia serio *La Voĉalbumo de Esperanto* eldonis gramofondiskon en 1973. Aŭdu, kion diras interalie Kalocsay:

Ankoraŭ unu poemon mi volas al vi laŭtlegi, kiu estas mia originalaĵo. Propre tiu poemo ne estas bone adresita al vi, nome pri la neologismoj mi temas kaj mi volas defendi la rajton de poetoj kaj iliaj neologismoj. Kaj bone mi scias, ke kiam mi diras tion al vi, mi frapas nefermitajn pordojn, ĉar ĝuste en miaj manoj estas la admirinde bona nova vortaro ESPERANTO-JAPANA, kiu enhavas ĉiun kurtaĵon, eltrovaĵon, ĉiujn vortojn de poetoj kaj diabloj. Nu pri kiu temas en tiu poemo? Nome mi volas diri iom: Foje la Japana Instituto, Japana Societo Esperanta faris gravan rezolucion kontraŭ la neologismo, sed mi estas certa, ke tio ne devenis el japanaj koroj, ke tio dormis en la koro de certa Jozefo Major, kiu tiam laboris al Oomoto, kaj mi ne scias, kial li volis la japanojn eduki kontraŭ neologismoj. Antaŭ nelonge li travojaĝis Budapeŝton, kaj li vizitis ankaŭ ĉe mi, kaj ĉi tie li diris, ke li reviziis sian opinion kaj hodiaŭ li ne estas plu kontraŭneologisto...

Nun tamen mi devas laŭtlegi la poemon:

La Fundamento kaj la Palaco

*Ho esperanto! mia temo
amata, kiam la kantemo
min kaptas, vidu, lastatempe
min jam minacas anatemo,
ĉar mi kuraĝis vin tro ami,
jes, oni volas min proklami
hereza, ĉar per nova brilo
kaj riĉ' mi volas vin ornami.*

*Sed mi toleras sen lamento;
defendas min la argumento:
palacon pompan alpostulas
la pompa firma fundamento.*

*Ni do konstruo sen ŝancelo
tiun palacon de la Belo
Por kiuj fundament' sufiĉas,
nu, tiuj loĝu en la kelo!*

156 En: Lingvo-Libro 1934:1, p. 2-3.

157 En: Eszperantó Magazin 1974:4, p. 6.

11.2.5 Batalhalto

Post la senindulga tempesto kulminanta en la japana Rezolucio Kalocsay retiriĝis de sur la batalkampoj. Sur la paĝoj de *Literatura Mondo* kaj ĝia suplemento *Lingvo-Libro* ne estis temo la neologisma demando. Tamen la malkonkordon (kiu montriĝis en la tendaro de kontraŭneologoj) Kalocsay ne povis elteni senvorte. Li kamuflis sin per la virina kaŝnomo *M. Alice Pik* kaj vere mallice resumis la konflikton sub titolo:

Batalo en la mallumo.

En kelkaj varmsangaj landoj estas kutimo inter la batalema kampara junularo, ke volonte interbati kun plena plezuro kaj sen ĝeno, oni disrompas la lampon per trafe direktita vinbotelo. Estiĝas plena mallumo. Tio estas tre oportuna, ĉar ĝi certigas absolutan senpartiecon. Neniu scias, ĉu tiu, kiun oni batas, estas amiko aŭ malamiko.

En nia Esperantujo unu el la plej taŭgaj batalokazoj estas la neologisma demando. Kaj — ŝajne oni jam disrompis la lampon, ĉar alie oni ne povas kompreni, ke sampartianoj batas unu la alian...

Dume mia amiko, danĝera neologismulo, prenas sian skribmaŝinon kaj komencas febre labori.

"Kion vi faras?" mi demendas.

"Neologismojn!" li respondis rikane. "Jen la ĝusta momento. La ortodoksuloj ne havas tempon por min bati, ili nun draŝas unu la alian..."¹⁵⁸

*

Estas fakto, ke post la japana Rezolucio dum kelkaj jaroj estis batalpaŭzo almenaŭ flanke de Kalocsay. Certe el ambaŭ tendaroj multaj konsentis la vortojn de Saint Jules Zee, kiu en 1937 salutis la poetofratojn okaze de la 25-jara jubileo de ilia esperantistiĝo jene:

"... Ilia iama kverelo plenigis la korojn per bedaŭro kaj maltrankvilo. Okaze de la festo, mi esprimu la esperon, ke tiuj du ĉefaj fluoj — niaj Tigriso kaj Eŭfrato —, kiuj devenis el la sama fonto, sed vojmeze turnis al si la dorson, fine kunfluu kaj ĉiam alportu fruktodonan ŝlimon al nia verda lando..."¹⁵⁹

*

Vere: la duelo inter Baghy kaj Kalocsay finiĝis. En tiuj jaroj Kalocsay jam ne batalas por la rajtoj de la novaj vortoj, li nur persiste uzas ilin.

Karikaturo de St. Barta. 1937
Represo el ARGËNTA DUOPO.

La Vipo (1938:1) ankoraŭ satiras epitafe lian neologemon:

*Kalocsay — brila el la poetoj
Nekompreneblaj estis liaj sonetoj.*

Stranga hazardo: en la sama jaro ĉesis *Literatura Mondo*.

Por Kalocsay komenciĝis la tempo de izolo.

Komenciĝis la mondmilitaj jaroj.

*

158 En: *Lingvo-Libro* 1934:2, p. 23.

159 En: *ARGENTA DUOPO* p. 130.

11.2.6 La oponentoj ne interpaciĝas

1947: Post la dua mondmilito reviviĝis *Literatura Mondo*. Ĉe la starto de la tria periodo de la revuo la redaktaro opiniis necesa akiri abonantojn el ambaŭ tendaroj. En la ĉefartikolo de la unua numero skribis Kalocsay:

*...Ĉar temas pri LM, oni devas tuŝi ankaŭ la demandon de la neologismoj. Kiel multaj memoras, en tiu punkto trafis nin atakoj amase, ofte ne tutaj motivitaj atakoj... Ni kredas, ke en la intermilita tempo okazis granda, eble tro granda riĉiĝo, nun devas sekvi paŭzo. Kaj tiu paŭzo kredeble trankviligos la ortodoksulojn: se ili vidos, ke ne minacas senfina kaj seninterrompa ŝveligo de nia vortaro, ili eble estos pli toleremaj rilate la jam uzitajn neologismojn. Kompromison ni proponas, kaj, ĉar mi vivas la tempon de la politikaj kompromisoj, ni eble povas esperi la saman kompromison eĉ en kampo ŝajne ankoraŭ pli sovaĝbatala: en la kampo de lingvistiko. Cetere, eĉ tiuj malnovaj neologismoj aperos precipe en poemoj, en prozo ni estos preskaŭ puritane ŝparemaj pri ili...*¹⁶⁰

*

La kompromiso — proponita de Kalocsay — ne realiĝis. La neolog-militantoj ne venis al interkonsento. La polemikoj pri la neologismoj daŭris sur la paĝoj de diversaj revuoj.

*

"... Mi memorigas vin — argumentas iu el la kontraŭneologa tendaro — ke multaj samideanoj eĉ ne havas PLENAN VORTARON... la gazeto estu facile komprenata sen strebado eĉ de komencantoj..."¹⁶¹

*

1949: Ĉesis *Literatura Mondo*. Estis la tempo de "malvarma milito". Silentis ankaŭ Kalocsay.

*

1956: KOKO (Kopenhago) eldonis la verse reverkitan EZOPA SAĜO-n de Kalocsay. La Aŭstro A. Halbedl recenzanta la libron, skribis interalie:

"... mi nun diras, ke mi priplendas la eldonon de tiaj verkaĵoj, kia estas la nun recenzata. Ili ja donas nuntempe ankoraŭ mortigan venenon al la lingvo de la universala demokrateco, kio Esperanto estu kiel ĉiama helplingvo. Ĝi ne estas arcanum, ne adeptaĵo de sekretiĝema klano kiel jam la latino, fariĝinta la apertiga idioma de la scienco kaj supera klaso de la socio... laŭ mi estus pli bone, se K. K. ne plu estus reveninta al ni, la artisto-deloginto de aliaj imitemaj talentuloj... Pri la bedaŭrinda devojiĝo de K.K. kulpas ankaŭ tiuj flatemuloj, kiuj scias lin nur glorigi eĉ pro liaj lingvaj kapricoj... Kiel konscia kaj konsciencia esp-isto mi tial ne povas rekomendi tiun ĉi libron..."¹⁶²

*

1957: Dum la *Universala Esperanto Kongreso* en Marseille, la publika kunveno de la *Akademio de Esperanto* okupiĝis pri la demando de neologismo, ĉar jam multaj protestis kontraŭ la troa plimultigo de neologismo. Post la ekspliko de diversaj vidpunktoj elformiĝis ĝenerala opinio, ke oni ne eblas ĉiujn neologismojn neglekti, sed oni devas limigi ilin kaj enkonduki novajn vortojn nur vere necesajn.

*

La opinio de la *Akademio* ne kvietigis la la oponentoj, ili estis nelaciĝemaj. La demando de neologismo restis plu konstanta temo de la gazetaro.

Jen kelkaj citaĵoj el la tiutempaj revuoj:

"La neologismo estas danĝera malsano, kancero, kiu emas ĉiam disvastiĝi"

"... Samideano X nomas la plendantojn <pigruloj>, por kiuj ne valoras lerni 200-300 radikojn. Li malpravas! Se temus vere 200-300 radikoj, neniu plendus. Domaĝe la fakto estas tute alia. La fonto de la neologismoj estas neelĉerpebla... La literaturistoj senbride ĉerpas el la ne-elĉerpebla fonto. Por ili la vortprovizo povas esti neniam sufiĉe abunda. Ĉi tie estas la danĝero! Ĉi tie montriĝas kancero... Laŭ mia opinio ne la plendantoj sed la verkistoj estas <pigruloj>, se ili, havantaj grandegajn kaj altegajn ambiciojn, ŝparas la penon per tutforte serĉi, trovi kaj uzi majstre kaj inventeme ĉiujn rezervojn latente kaŝiĝantaj en nia lingvo mem! Ili kontentiĝu la rezultatoj atingebraj sur tiu ĉi tereno kaj ne klopodu flugi supernube, ĉar la plimulto de la esperantistaro marŝas surtere kaj havos kapturniĝon!"¹⁶³

*

"... Oni diras, ke la neologismo ne estas danĝera por la lingvo, ĉar tiuj el ili kiuj estas maltrafe kreitaj, formortos, kaj restos nur tiuj, kiuj vere utilas al la lingvo. Tamen pri kiu kulpo nun ni estas punataj, devigata legi verkojn sursemitajn per tiuj ĉi dornoj, pikantaj niajn okulojn?... Pri la neologisma ĥaoso, progresante en nia lingvo, eĉ pli ol verkistoj estas kulpaj niaj vortaristoj, kiuj ne ĉiam ĝuste komprenas sian rolon kaj sian respondecon antaŭ la lingvo... Tial la vortaroj tute patologie ŝvelas... Kaj la poeziaj <fakvortoj> de la Parnasa poezio? Ili ja en tuta preta listo estis al la poetoj proponitaj de la aŭtoroj de la PARNASA GVIDLIBRO!"¹⁶⁴

*

"... Se ni allasos la uzon de tiuj ĉi novaj vortoj — en komenco rekomenditaj kaj uzitaj nur en poezio! — ni malfermas la pordegon por detruigi la Zamenhofan sistemon de simpleco, logikeco, facileco..."¹⁶⁵

*

"... Kun indigno mi sciigas al vi, ke mi deziras malaboni de *Monda Kulturo*. Kvankam ĝi estas tre belaspekta, la lingvo estas terura. Laŭ mia opinio kaj tiu de multaj aliaj esperantistoj, MK nur konstruas turon babelan inter la esperantistaro kaj faras detruan laboron al Esperanto, ĉar ĝi abundas de abomenaj neologismoj... Jes, la lingvo de MK vere naŭzas min kaj mi esperas tutkore, ke ĝi baldaŭ ne plu aperu!"¹⁶⁶

(Jen respondo de la redaktoro en la sama n-ro de la revuo).

"Brrr! Kara, se via plumo estus lanco, se via skribmaŝino estus pafilo, ni jam subkuŝus por la eterno!..."

*

1966: Aperas REĜO LEAR en la traduko de Kalocsay.

"... Nun mi pli kaj pli timas, ke nia poezia lingvo pli kaj pli deflankiĝas de la ĉiutaga parolata lingvo ne nur gramatike sed antaŭ vorte. Eble en iun tagon la nova Esperanto-poezio estos komprenata nur de la poetoj, kaj eble pli poste, nur la verkinto mem... En Esperanto jam ŝvarmas tiom da neologismoj, kiuj jam maltrankviligis kaj konfuzis multajn esperantistojn..."¹⁶⁷

*

"... se iu meza esperantisto havos deziron ĝuigi sian animon per legado de ŝekspira klasikaĵo, mi timas, ke prefere li tion faros per la originalo aŭ per sia nacilingva traduko, kie li ne estos almenaŭ devigata enuigi sin per deĉifrado de neologismaj sagacaĵoj. Do la abismo inter la Esperanta literaturo kaj la popolo de Esperanto ĉiam profundiĝas. En tiu senco estas farita ankoraŭ unu paŝo..."¹⁶⁸

(La lasta riproĉo)

"... En Hungara Vivo 1974, n-ro 6, estas bela rakonto pri viro, kiu post longa mallibereco iras hejmen kaj retrovas la fidelan edzinon.¹⁶⁹ Ĝin tradukis la fama Kalocsay, kiu ĉiam pli ŝatas malfaciligi la lingvon por ordinaraj esperantistoj, kiuj ne disponas pri la granda lingva erudicio. En ĉi tiu trafa sed simpla historio pri ĉiutagaĵoj, kiuj supozeble estas facile komprenebla en la originala hungara lingvo, li uzas i. a. jenajn vortojn: *moroza, trivita, prizono, ascendi, descendi, paneo, aparta, fronda, loza*... Ĉu tio ne estas krimo kontraŭ nia Zamenhofa lingvo? Tiuj erudiciuloj subfosas la fundamenton kaj malbone agas... Kaj tiuj eminentuloj rikoltas laŭrojn de gloro de multaj admirantoj!!!"¹⁷⁰

Ĉi tiuj defiaj artikoloj ne instigis la "vortmaniulon" Kalocsay al publika disputo. En la sesdekaj jaroj li luktis jam sur alia batalkampo, kie furiozis la Ata/Ita milito, kaj poste li strebis akceptigi sian vort-teorion.

Oni povas supozi ke la lingvoriĉiganto ricevis dankon almenaŭ de la neologoj. Ne tiel okazis. Kalocsay montris ĉiam toleremon solvi la konfliktojn, kiuj foruzas multajn energiojn. Inter la novuloj troviĝis eĉ ne unu senpacienca persono, kiu indignis pro la toleremo de Kalocsay, kaj ili premis sur lin novan stampon: OPORTUNISTO

160 En: Literatura Mondo 1947:1-2, p. 1-2.

161 En: Internacia Kulturo 1948:1-2, p. 23.

162 En: Paco 1956:34-35, (Ĉeĥoslovaka eldono), p. 17-18; vd p. 18/a.

163 En: Nederlanda Esperantisto 1958:junio, p. 42-43.

164 En: Nuntempa Bulgario 1963:aprilo, Suplemento, p. V.

165 En: Nuntempa Bulgario 1964: februaro, Suplemento, p. V.

166 En: Monda Kulturo 1964:7, (Printempo), p. 223.

167 En: HdE 1966:sept. 20, p. 4; La Espero 1967:7-8, p. 53.

168 En: HdE 1966:16, (1425), p. 4.

169 Novelo de T. Déry: *Amo*.

170 En: Internaciisto 1975:8.

11.2.7 Argumentas Kalocsay

...
*La lingvo vivas, kreskas kaj burĝonas
kaj frukte — ankaŭ novajn vortojn donas.
Tre delikata tem': neologismo
kion tre ege malamika prismo
rigardas kelkaj kaj se pri ĝi temas,
plej indigneme ili anatemas.*¹⁷¹

*

"La Esperantan literaturon kaj precipe la poezion plurfoje oni nomis Cindrulino. Vi konas la samnoman fabelon, ne estas do necese klarigi, ke per tio oni volis signi ion modestan, malaltsortan, kompatindan, kiu sidas en la angulo de la Esperanta domo, dum ĉe la tablo bruas la propagando kaj organizo, kiel la ĉefaj faktoroj de la movado. Kaj laŭ la oficiala opinio tio estas tuta memkomprenebla: laŭ ĝi la literaturo ne apartenas al la vera celo de la lingvo. Sed la poetoj kaj la verkistoj, de kiuj devenas la epiteto Cindrulino, alie komprenis tiun nomon: ili ĝin rigardis konstato de bedaŭrinda fakto, pri kiu oni devas iel helpi. Kaj certe ili elektis tiun vorton tial, ĉar ĝi esprimas ankaŭ esperon. En la fabelo ja alvenas la savanta reĝido, kaj Cindrulino iĝas reĝidino.

Ĉi tiu diverseco de opinioj estus sensignifa, se ĝi restus nur ĉe teoriaj konsideroj. Sed ĝi havas ankaŭ praktikan flankon.

Se oni rigardas la literaturon nur flanka afero, preskaŭ nur tolerata amuziĝo de kelkaj simpatiaj somnambuloj, kompreneble oni taksas tro granda ĉiun oferon, kiun ĝi kostas. Eĉ la enkonduko de unu sola vorto estas malsimpligo, do ofero, kiun ne valoras tiu kuriozaĵo.

Aliflanke, se oni rigardas la literaturon grava faktoro en nia movado, kompreneble oni devas ĝin fari literaturo vera. Oni ne volas kontentiĝi per ĝia nura ombro, per kompatinda surogato, kiu vivas nur el la almozoj de bonvola indulgemo. Oni do klopodas en Esperanto interpreti la ĉefverkojn de la mondliteraturo, oni strebas ankaŭ por literaturo originala, kiu estu, se ne egalranga al la naciaj, almenaŭ leginda valorizaĵo. Sed tia klopodado, tia laborado submetas nian lingvon al fortostreĉoj tute novaj. Oni volas traduki senmanke, do transdoni ne nur la nudan sencon, la ekstrakton de la originaloj, sed ankaŭ ties ĉiujn nuancojn kun la sama esprimriĉo kaj elvoka forto. Kaj per tio la literaturistoj neeviteble surpaŝas vojon, kiu teruras la adeptojn de la simpleco: la vojon de evoluigo kaj pliriĉigo..."¹⁷²

La Zamenhofa ekzemplo

Antaŭ sia morto Zamenhof intencis fari grandan GERMANAN-ESPERANTAN VORTARON, do ili rekte serĉis la okazon por la enkonduko de novaj vortoj kaj por la sankcio de la neologismoj enkondukitaj de aliaj aŭtoroj. Li opiniis alveninta la tempon por la kompletigo de la lingvo.

De kiam mi legis pri ĉi tiu intenco de Zamenhof, la penso ne lasis min trankvila: ĝin la Majstro eldiris en sia lasta letero, ĝi estis kvazaŭ lia testamento, oni devus ĝin fari, oni devus transpreni la taskon, kies plenumon li revis.

La vortoj enkondukitaj aŭ uze akceptitaj de Zamenhof estas ĉirkaŭ 4000. Ĉar ilian enkondukon li faris iom post iom dum tridek jaroj, ni povas al ni permesi la malgrandan matematikon, ke li enkondukis po 1300 vortoj dekjare kaj po 130 jare. Kiel ajn miriga ŝajnu ĉi tiuj ciferoj, ĉi tio estas fakto. Nun ni rigardu, kiel evoluis tiu "lingvohipertrofio. Ni faru la saman malgrandan matematikon pri la PARNASA GVIDLIBRO.

Ĝi entenas 609 vortojn netroveblajn en SAT-vortaro. Inter ili troviĝas 22 plejparte Zamenhofaj interjekcioj. 11 vortoj de Zamenhof, 123 el Boirac, 36 el Cart kaj Pagnier, 46 el Grabowski, 19 el Rhodes, 24 el Verax, 3 el Kabe, 4 el Radvan-Ripinskij, 2 el Packness, 76 el Grosjean-Maupin, do minimume 366 vortoj devenas ankoraŭ el la tempo de la "natura" evoluo. Restas do 243 vortoj.

Ĉar la PLENA VORTARO enhavas preskaŭ ekskluzive antaŭmilitan materialon (almenaŭ en la neteknika parto), ĉi tiuj 243 vortoj estas la registrita rezulto de la tuta postmilita riĉiĝo. Tio signifas 16 vortojn jare. Oni komparu tiun kun la jaraj 130 vortoj de Zamenhof, kaj poste diru, ĉu troviĝas ĉi tie tre grava ŝanĝo de "natureco"? Oni povas do argumenti kontraŭ la neologismoj kiel ajn, sed la ekzemplon de la Zamenhofa periodo oni lasu trankvila, ĉar per ĝi oni refutas nur sin mem.

Sed — oni povus diri — "quod licet lovi, non licet bovi".¹⁷³ Post Zamenhof la lingvo ne povas plu riĉiĝi. Kion Zamenhof ne uzis, pri tio la lingvo rezignu por ĉiam.

Zamenhof, kiu tiom klopodis por sendependigi de sia propra persono la sorton de la lingvo, certe mem protestus plej akre kontraŭ tio. Kaj estus ja tute false dependigi riĉecon de lingvo de tia eventualaĵo, kia estas la vivdaŭro de mortema homo. Ĉar tio ja signifus ke, se Zamenhof estus vivanta ankoraŭ dek jarojn, ni havus rajton por pliaj 1300 vortoj, kaj se li estus mortinta dek jarojn antaŭe, ni estus perdintaj 1300 vortojn el la lingvo.

"Mistifikado per matematika ĵonglado" — oni diros eble. — "La Majstro certe estus bremsinta tiun riĉiĝon en la sekvaj dek jaroj." Se ni prenas ekzemple la vortaron (tute ne kompletan) de Christaller, kaj vidas, kiel multaj vortoj estas tie ne tradukitaj, sed klarigitaj, ni devas supozi, ke en la VortarEGO planita de Zamenhof enhavus multe pli multajn neologismojn, ol kiom mi riskis proponi en la PARNASA GVIDLIBRO. Precipe, se ni konsideros, ke Zamenhof en siaj lastaj verkoj uzis vortojn (grego, strikta, treti, ŝrumpi, amara, koĉero, kalva, strebi ktp, ktp), kiuj montras klaran tendencon: preni novajn radikojn anstataŭ kunmetaĵoj...

Kaj mi prenis laŭvorte la konsilon kaj ekzemplon de Zamenhof, ke la lingvon oni devas riĉiĝi...¹⁷⁴

Jen kelkaj vortoj enkondukitaj de Kalocsay:

ĉipa - malmultekosta

grioto - acida ĉerizo

grivoj - rostitaj kaj elpremitaj lardopecoj, grasŝrumpaĵoj

hat - malami

ĵuĵuo - luksaĵeto, kurioza bagatelaĵo

plumono - granda, tre malpeza kuseno, entenanta lanugon aŭ plumojn, kaj metata superlitkovrilo (peplomo)

stinki - malbonodori, odoraĉi (Kvankam ĉi tiu vorto troviĝas jam en PARNASA GVIDLIBRO, tamen en la glosaro de INFERO Kalocsay signas, ke ĝi estas unuafoje uzita.)

ŝriki - alt- kaj tranĉvoĉe krii kiel terurita virino

*

Ne nur unufoje li uzis vortojn netroveblajn en la plej konataj vortaroj:

adversa - kontraŭaga, kontraŭbatala

disdegni - malŝati, malrespekti

falva - tre hele flava

minca - maldika (Poste ĝi registriĝis en PIV)

pita - malgranda

Kalocsay trarigardis la plej konatajn vortarojn, elminis kaj uzante pledis por jam longe ekzistantaj kaj dormantaj neologismoj kaj registris ilin en la PARNASA GVIDLIBRO. Do la plej trafa epiteto de la neologemo Kalocsay estus: **Edukpatro de neologismoj.**

171 En: C. E. R. Bumy: La arto poetika.

172 En: La perspektivoj de la Esperanta literaturo. Prelego de Kalocsay en la XII-a Somera Universitato, en Vieno 1936.

173 Latinaĵo: Kio licas al Jovo, ne licas al bovo.

174 Ne plene konservita manuskripto de Kalocsay. Ĝi aperis unuafoje en VERSOJN p. 58-60.

11.2.8 La elirvojo

Ĉi tie kolizias akvo kaj fajro estas do kompreneble, ke estigas granda bolado kaj densa nebulo, en kiu oni ne trovas la elkondukan vojon.

En la demando de neologismo akre kolizias la interesoj de la propagando kaj de literaturo: Kiel fari do ian kompromison, por kontentigi ambaŭ partiojn? Nu mi diras ja, ke la afero estas malfacila. Tamen ekzistas eblo.

Mi petas konsideri la jenon: ĉiu teknika fako havas aŭ devus havi sian fakvortaron, ĉu ĝin ne bezonas la poezio, kies materialo estas la vortoj?

En tiu ĉi dilemo, laŭ mia opinio, la solvo doniĝas per si mem. Ni apliku la principon de la neceso kaj sufiĉo. Ĉiu el ili havu tiom, kiom por ĝi necesas. Ekzistu vulgara vorttrezoro, uzata de tiuj, kiuj nur korespondas, kolektas, kongresas, legas movadajn gazetojn, faras negocojn, eble amindumas kaj edzigas per Esperanto. Por ĉi tiuj ekzistu ankaŭ facila, senpretenda literaturo, legolibroj, krestomatiaj ktp. Sed krom ĉi tiu vortprovizo ekzistu ankaŭ vortprovizo literatura, komprenata de tiuj, kiuj havas pretendon pri pli alta, literatura plezuro.

Tio ne signifas, ke ekzistas du apartaj lingvoj, ĉar la literatura lingvo enhavas la vulgaran lingvon senmanke, nur ĝi havas krom ĝia vortprovizo ankoraŭ pluson: literaturan vortprovizon.

Kompreneble ĉi tiu pliriĉigo devas esti bridita. Unua regulo: ĉiu ekzistanta oficiala radiko restas neŝanĝebla! Dua regulo: novajn vortojn enkonduku nur tiu, kiu funde konas Esperanton, scias lingvon krom la sia, havas viglan lingvosenton kaj senton pri la gusto de Esperanto. Kaj tia enkonduko neniam okazu facilanime, sed ĉiam post konsulto de ĉiuj bonaj vortaroj, kaj kun plena sento pri respondeco.

El la dilemo do la sola elirvojo estas la apartigo de poezia kaj vulgara vortprovizoj. Plena libereco en la evoluo de la literatura lingvo, pli vasthorizonta, pli pacienca konsidero de la poeziaj lingvobezonoj, klarigo de ĉiuj neoficialaj vortoj en ĉiuj verkoj: jen estas la solvo de ĉi tiu malfacila demando.¹⁷⁵

175 El la postlasita manuskripto de Kalocsay.

11.2.9 Finvortoj

Koncerne la neologismojn la lasta deklaro de Kalocsay troviĝas en la *Antaŭparolo* de DOMFABRIKO, kies aŭtoroj ne deziras longe argumentadi, ili donas nur kvazaŭ konsilon al la legantoj jene:

"... La esperantaj esprimoj enhavas ankaŭ kelkajn poeziajn aŭ malofte uzatajn vortojn, t. n. neologismojn. Ni riskis enmeti ilin, ĉar niajn <panelojn> oni uzos ja ne en la ĉiutaga parolo, sed en pli-malpli altpretendaj literaturaj tekstoj. Aparta utilo de nia libro estos, sed ĝia studanto lernos tiujn vortojn kaj amikiĝos al ili, ĉar tiamaniere, trovinte ilin aliloke en sia legaĵo, li perdos nek ties sencon, nek sian ekvilibron..."

La argumentadon de Kalocsay fermu la poemo:

KONFUZA BALADO
pri neologismoj kaj mondpereo

*Mi kredas je la Nova Sento,
Mi kredas je la Forta Voko,
Kvankam nun gento kontraŭ gento
Armadas sin en ĉiu loko.
Mi kredas, ke post ĉi epoko
Kunfrate povos ni feliĉi.
Mi kredas firme kiel bloko,
Ke nia lingvo rajtas riĉi.*

*Mi kredas je la argumento
De l' Temp': forflugos, kiel floko
En la potenca blov' de vento,
Kio ĝin spitas kun provoko.
Kaj tial kun fier' de koko
Mi streĉas mian gorĝon kriĉi,
Kriante antaŭ la Sufoko,
Ke nia lingvo rajtas riĉi.*

*"Ne helpas fluo de torento,
Se jam fritita la ezoko!"
Jes ja, ni vivas en turmento,
Kaj kiel fiŝo sur la hoko,
Aŭ trupo sub lavanga roko,
Al mort' ni devas nin dediĉi,
Sed kredas mi, per spit' aŭ moko,
Ke nia lingvo rajtas riĉi.*

*Princ' Mondo! Pretas murda stoko!
Bonvolu per ĝi plezuriĝi!
Sed kredis mi, jam sub la Soko,
Ke nia lingvo rajtas riĉi.*

1936

11.2.1 Esenca bibliografio

- Kopar: *P. de M. Leterkesto*.
LM 1925/januario, posta interna kovrilpaĝo.
- Kopar: *J. B. Leterkesto*.
LM 1925/aprilo, posta interna kovrilpaĝo; vd p. 4-5.
- Kalocsay, K.: *Lici, darfi, durfi*. Resumo de polemiko, kiun iniciatis L. Totsche.
LM 1931/227-228.
- Baghy, J.: *Ĉu Ido aŭ Poliglot? — Ne! Desperanto*. Satira poemo.
LM 1933/14; vd p. 5-6.
- Kalocsay, K.: *Publika letero al s-ro Dratwer*.
LKr 1933:13, p. 2.
- Kalocsay, K.: *Kara Baghy!*
LM 1933/14-16; vd p. 6.
- Baghy, J.: *Kara Kalocsay!*
LM 1933/40-41; vd p. 7.
- Kalocsay, K.: *Kara Baghy!*
LM 1933/41-42; vd. p. 7.
- Kalocsay, K.: *La evoluo de nia poezia lingvo*. Prelego en la Somera Universitato dum la Oxforda Kongreso en 1930.
En: LINGVO, STILO, FORMO p. 49-76.
- Baghy, J.: *Danĝera vojo*.
Oomoto Internacia 1933:2-3, 4, 5, 6; LKr 1933:14, 15, 16; vd p. 10.
- Karczag, G.: *Revuoj de revuoj. Kaj nun: Hungara Heroldo*.
BG 1933:4, p. 59.
- Schwartz, R.: *Ping Baghy! Pong Kalocsay! — Publikaj leteroj inter Atrof Orkas kaj Genio Funel*.
La Pirato 1933:6; repr. en: AD p. 186-187; vd p. 8.
- Schwartz, R.: *En Okcidento Luks!*
La Pirato 1933:7, p. 98; LL 1934:1, p. 1-2; vd p. 8-9.
- Takács, J.: *La literaturaj Donkiĥotoj*.
HH 1934:1, p. 3-4; vd p.11.
- Karczag, G.: *Rezolucio de la XXI-a Japana Esperanto-Kongreso*.
LL 1934:1, p. 1; vd p. 11-12.
- M. Alice Pik: *Batalo en la mallumo*.
LL 1934:2, p. 23; vd p. 14.
- M. Alice Pik: *La tri tentoj de Petro Ĝisost*.
LL 1934:3, p. 39.
- Kalocsay, K.: *La perspektivoj de la Esperanta Literaturo*. Prelego en la XII-a Somera Universitato dum la 28-a UK en Vieno, 1936.
En: DPr p. 55-70; vd p. 19.
- (-y): *Pri la vortoficialigo*.
LL 1935:4, p. 217-218.
- Halka, L.: *Ĉe Kolomano Kalocsay*. Intervjuo.
En: AD p. 30-40 (p. 35-38).
- Kalocsay, K.: *La kvindek jaroj de la lingvo*.
En: OL p. 176-186.
- Kalocsay, K.: *La neologisma problemo. Al k-do L. Melotte*.
IK 1948:1-2, p. 23.
- Kalocsay, K.: *Esperanto kaj literaturo*.
GVIDLIBRO II. p. 85-86.

Csiszár, A.: *Kalocsay, la neologo.*

LF: 1980:59, 60, 61, 62, p. 4-5, 34-38, 65-68, 93-95.

Mayer, H.: *Kalocsay, la neologo kaj liaj falsaj disĉiploj.* Prelego en la 5-a ILF.

LF 1987:104, p. 7-11.

Mayer, H.: LA ETERNA NEOLOGISMA DISKUTO: KALOCSAY KAJ
LA SEKVO.

Vieno: Kramer, 1987. 26 p.

Vatré, H.: *La prefikso mal- kaj la neologismo en pluraj verstradukoj de
Kalocsay.*

IF 1989:2, p. 43-49.

Csiszár, A. "*Danĝera vojo*".

En: VERSOJN p. 55-60; vd p. 10.

11.3 EN LA -ATA/ITA-BATALO¹⁷⁶

11.3.1 Enkonduko

Inter la diskutoj pri la Esperanto-gramatikaj demandoj en la 1960-aj jaroj frontloke staris la polemiko estiĝinta pri la particip-uzado en la pasiva konjugacio, vulgare nomata la ATA/ITA problemo, kiu dividis la esperantistojn en du partiojn.

Koncize pri la kerno de la malkonkordo

Temas pri tio, ke al la samaj verboformoj (ekz. *estis -ata* kaj *estis -ita*) la du partioj atribuas malsaman signifon. La unua skolo, nomata ATISTOJ atribuas al *-ata* la signifon de ago samtempa al la priparolata momento, sendepende de tio, ĉu la ago estas jam plenumita aŭ ne, kaj ili uzas la participon *-ita* kiel signon de antaŭtempo aŭ de stato post la plenumita ago.

La dua skolo, nomata ITISTOJ aplikas la participon *-ata* en la senco "komencita- nefinita ago aŭ agoserio" kaj la participon *-ita*, kiam temas pri unu difinita ago rigardata kiel perfekte plenumita aŭ plenumota fakto.

11.3.2 Skiza historio de la -ata/-ita batalo

Pri la ĝusta uzado de la pasivaj participoj estis duboj jam en la fruaj jaroj de la lingvo, ĉar la tre konciza FUNDAMENTA GRAMATIKO kaj EKZERCARO ne sufiĉas ĝisfunde kaj detale fiksi ĉiujn erojn de la gramatikaj demandoj, kaj Zamenhof mem eksplicite ne enmiksiĝis en la aferon. En tiuj jaroj ĝenerale la pli granda parto de la esperantistoj ne multe zorgis pri la problemoj, pli ĝuste ili ne havis eĉ dubojn ĉi-rilate. Ili aplikis la formojn laŭ la reguloj de la lernolibroj, el kiuj ili lernis. Do la uzadon kaj disvastigadon de la du sistemoj influis ĉefe la lernolibroj, respektive la propra nacilingva sistemo de konjugacio. La -ata/-ita demando kiel problemoj anoncis sin unue ĉe esperantologoj, verkistoj. Poste la "leganta elito" mire kaj konfuziĝante observis la problemon, pri kies ekzisto ili sciigis ĉefe el recenzoj.

La komencon de la batalo Kalocsay kalkulis en la jaro 1932, kiam sur la paĝoj de *Lingva Kritiko* estiĝis polemiko inter eminentuloj. Estis memkompreneble, ke Kalocsay ankaŭ en tiu diskuto aŭdigis sian voĉon kaj kune kun Waringhien li fariĝis la ĉefa reprezentanto de la itista tendaro.

En la FUNDAMENTO la 6a regulo indikas nur tempojn kaj diras nenion pri aspektoj, kaj ĝenerale ankaŭ la lernolibroj ne dediĉis atenton al tiuj formoj de la verbo, kiujn determinas Kalocsay-Waringhien en PLENA GRAMATIKO de ESPERANTO jene:

"La aspektoj estas diversaj formoj, per kiuj oni esprimas la manieron, kiel oni rigardas la agon, ĉu kiel komenciĝantan, aŭ kiel ne daŭran, aŭ kiel daŭrantan, aŭ kiel finitan."

Kiam en 1935 unuafoje aperis PG, la aŭtoroj submetis la verkon al publika kritiko kaj en la revuo *Lingvo-Libro* aperis pri ĝi detalaj diskutartikoloj, sed neniu el la kompetentaj diskutantoj protestis kontraŭ la aspektisma sistemo. La batalo ekflamis nur post la apero de la unua parto de la tria eldono de PG en 1958. Kvankam la libro prezentis la itismon kiel normon tute same kiel en 1935, tamen la tria eldono vekis la indignon de la atista tendaro, ĉar la aŭtoroj en la Antaŭparolo atentigis la leganton jene:

"Pro diversaj kaŭzoj (...) prospero de la movado en la nord-eŭropaj landoj; malplia kunlaborado de slavlingvanoj, kio senigis nian literaturon je la kontakto kun tiu fekunda kaj iel naskiĝa lingvogrundo; okupo de gravaj postenoj fare de germanlingvanoj (...) estiĝis ia malekvilibro inter la influoj de diversaj naciaj lingvoj sur nian Esperanton, kaj ia superpezo de la ĝermana efiko. Nu, unu el tiuj trajtoj, kiuj diferencigas la germanan (kaj nederlandan, danan ktp.) lingvon disde la aliaj eŭropaj lingvoj, kaj disde Esperanto, estas ĝia fremdeco al la gramatika kategorio de la aspekto, t.e. al la konsidero de la ago koncerne ties daŭron kaj plenumitecon. El tio rezultis, ke oni en tiuj landoj komence miskomprenis la Esperantan uzadon de la participoj, kaj poste elpensis novan participsistemon ĉe la pasivaj verboj, kiu respondus al la aparta 'logiko' de la germanlingvanoj, sed tute ne konformas al la 'spirito' de nia lingvo. Tiu reformo (...) ĉar ĝi estas, fakte, reformo (...) minacas per breĉo en la lingva kontinueco kaj tradicio, ĉar ĝi stampas erara, aŭ almenaŭ eksmoda, la Zamenhofan lingvouzon en esenca parto de la lingvo..."

Ĉi tiuj vortoj pruvigis eksplodema materialo, al kiu servis kvazaŭ meĉo la recenzo de T. Jung,¹⁷⁷ en kiu la aŭtoro verve defendas la tempajn uzadon kontraŭ la aspekta uzmaniero proponita de PG. Same en 1959 aperis ĉe Stafeto la verko de Waringhien: LINGVO kaj VIVO, ene eseo pri la Esperanta pasivo pledanta por itismo. En HdE komenciĝis artikolserio, en kiu T. Jung kaj aliaj kompetentaj atistoj kaj du el la itistoj Kalocsay kaj Sonnenfeld) motivis siajn starpunktojn. El tiu ĉi serio jam evidentiĝis, ke inter la oponentoj faŭkas netranspontebla abismo.

La *Akademio de Esperanto* en publika kunveno de UK en Haarlem (1954) diskutis la problemon. La *itision* reprezentis Waringhien, la *atision* Faulhaber, Isbrücker, Jung, Degenkamp.

Dum la Brusela Kongreso (1960), la tiama prezidanto de la *Akademio*, J. R. G. Isbrücker iniciatis la diskuton per publika disdono de flugfolio, en kiu li resumis sian (atistan) teorion. Kvankam antaŭe oni planis, ke en la kunveno la publiko diskutu kun la akademianoj, la ideo ne realiĝis, ĉar la diskutantaj eminentuloj — Collinson, Lapenna, Střp-Bowitz, Waringhien, Pragano, Jung — konsumis la tutan tempon. Finfine la kunveno ne mildigis, sed eĉ akriĝis la situacion, kiun R. Schwartz¹⁷⁸ per trafa humoraĵo karakterizis jene:

"... La batalo ankoraŭ daŭras. Unuflanke la fanatikaj At-at-atoj, aliflanke la mistikaj It-it-itoj. Ekzistas ankaŭ tria tribo, la Ot-ot-otoj, sed tiuj ĉi estas pacemaj kaj restis ekster la milito..."

En oktobro 1961 aperis verko sub la titolo LA ZAMENHOFA ESPERANTO. SIMPOZIO PRI -ATA/-ITA. En la libro 11 diverslingvaj aŭtoroj pledas por la aspekta valoro de participoj. La libro vekis indignon en la atista tendaro opinianta, ke ĝi donas falsan impreson pri la problemo, ĉar ĝi pritraktas unuflanke la temon, prisilentas la tezojn de la alia partio; krome la titolo sugestas, ke ekskluzive la aspekta participuzado estas Zamenhofa.

Verkoj, broŝuroj, recenzoj, replikoj, gazetartikoloj pli kaj pli ampleksigis la -ata/-ita literaturon, por tute ne paroli pri la cirkuleroj de la *Akademio*, pri multobligitaj publikaj leteroj kaj pri inundo de privata ĉi-rilata korespondado.

Laŭ la propono de V. Setälä en 1966 la *atistoj* fondis en la *Akademio de Esperanto* frakcion nomatan "Libera Akademia Rondo" (LAR), kies celo estis kunordigi la defendon de la tempa sistemo. (Cetere la teorioj de la sampartianoj ne konkordis en ĉio.)

En la ata/-ita literaturo la plej vastan eĥon (aŭ kverelon) vekis la supre menciita SIMPOZIO (pledas por itismo), la libreto de Setälä, Vilborg kaj Střp-Bowitz: ESPERANTO — MODERNA LINGVO (pledante por atismo) kaj la studo de Kalocsay: VOJAĜO INTER LA TEMPOJ, kiun la aŭtoro – laŭ la Antaŭparolo prezentas kiel respondon al la "akademia triopo", sed ne kiel batalskribaĵon. Vere, la tono de tiu ĉi studo — kvankam estas pasia — tamen ne tiom ofenda ol tiu de la SIMPOZIO kaj prezentas ankaŭ vidpunktojn de alipartianoj. E. Vilborg¹⁷⁹ recenzante la libron skribas:

"... Kalocsay estis ĉiam leginda, kaj en tiu ĉi verko skribita per la sango de sia koro, mobilizas ĉiujn fortojn de la lingvo por konvinki la legantojn..." Tio ne sukcesis.

Ambaŭ skolaroj kun plenaj fortoj strebis pravigi siajn tezojn, serĉis ekzemplojn en la verkaro de Zamenhof, sed tiuj ne estis konvenaj por konvinki la alipartianojn, ĉar Zamenhof ĉe la participuzado ne estis konsekvenca. La batalantoj elpensis testofrazon por trafa argumentado kaj reciproke klopodis montri la absurdaĵojn de la kontraŭaj tezoj.

El la diversaj tezoj devenis pli malpli karakterizaj nomigoj per kiuj la oponentoj baptis unu la aliajn:

Kalocsay la sistemon por kiu pledas SIMPOZIO PRI -ATA/-ITA, baptis *simpoziismo*, ties adeptojn *simpoziistoj*, la sistemon por kiu pledas la verko de tri akademianoj: ESPERANTO —

— MODERNA LINGVO, li nomis *antisimpoziiismo* aŭ *triopismo* kaj la aplikantojn *antisimpoziiistoj* aŭ *triopistoj*. (Estas interese, ke la nomigon *triopismo* kelkaj miskomprenis, pensante, ke ĝi estas neologismo. Ili ne rimarkis, ke temas pri simpla kunmetaĵo: tri-opismo.) La nomigo *tempismo* koncernas la *atistan tezon*, laŭ kiu la pasivaj participoj havas nete tempan signifon. Kontraŭe al tiu tezo, la *itisma sistemo* baziĝas sur la aspektaj formoj de la verbo, tial la adeptoj de ĉi tiu tendaro ricevis la nomom *aspektuloj*. Laŭ la *atista teorio* la pasiva voĉo devas esti en plena simetrio al la aktiva, do la disĉiploj de tiu teorio estas *simetriuloj*. Krom tiuj difinoj al la du sistemoj algluiĝis pliaj paralelaj nomigoj.

AL ATISMO

logika
racia
reforma
ĝermana
pluskvamperfekta

AL ITISMO

psikologia
oblikva
tradicia
universala
Zamenhofa

La polemiko ne estis fruktodona. En la arda diskuto sonis ne nur argumentoj, sed multfoje ankaŭ mokaj, ofendaj voĉoj. Jen kelkaj, per kiuj la antipodoj nomis la kontraŭajn tezojn:

ĝermo de katastrofo
devio de la netuŝebla Fundamento
artifikaĵo
blindumigo
semantika hibridaĵo
kreo de nova Babelo
panika simetrifobio
malproksimiĝo de la Fundamento

kreo de miskomprenoj
konscia detruo de Fundamento
teoria vakeco
anarĥia spontaneco
antaŭjuĝa mito
defetismo
viruso

La oponentoj sen skrupuloj insultis unu la aliajn:

skizmantoj
kunĵuriĝintoj
fanatikuloj
herezuloj
lilioj putraj
fuŝantoj de zamenhofa Esperanto
itistoj-idistoj

Enketo kaj decidoj de la Akademio pri la demando de la pasivaj participoj

La longdaŭra kaj senrezulta diskutado inter la skoloj (la polemika ricevis vastan publikecon en la gazetaro) instigis la *Akademion* solvi la -ata/-ita problemon. En 1965 G. Waringhien – kiu en tiu periodo estis la prezidanto de la *Akademio* – malfermis denove la debaton pri la participoj. Li prezentis al la akademianoj por voĉdonado 14 demandojn pri la pasivaj participoj de la FUNDAMENTA EKZERKARO. En tiu demando kontrastiĝas la interpreto de la du skoloj. La *Cirkulero* n-ro 79 de la *Akademio* en julio 1965 registris la rezulton de la voĉdonado, laŭ kiu el la tiamaj 46 akademianoj 24 respondis favore al *itismo*, 4 respondis nee, 2 mikse, 2 sindetene. Krome rifuzis partopreni en la voĉdonado 10 personoj. Ne respondis 3.

Baze de tiu voĉdono la *Akademio* konstatis:

"... La *Fundamento* entenas klaran instruon pri la uzado de la participo, kaj ke tiu uzado estas konforma ne al la kutimoj de la skolo A (tiel dirita 'atismo'), sed ja al la kutimoj Z (tiel dirita 'itismo')."

La direktoro de la *Gramatika Sekcio* de la *Akademio* – konsiderante la konkludojn de la enketo – decidis oficialigi la subajn principojn, kiel REZOLUCION.

"... La *Akademio* aprobe konsiderante la konkludojn de la Enketo de la Prezidanto pri la signifo de la ekzemploj de pasivaj verboformoj en la FUNDAMENTO; atentante la Raporton de la direktoro de la *Gramatika Sekcio*, decidis oficialigi jenajn principajn regulojn:

1^o – La Esperanta konjugacio konsistas nur el tri verbotempoj: la estanta (aŭ as-tempo aŭ prezenco), la estinta (aŭ is-tempo, aŭ preterito) kaj la estonta (aŭ os-tempo, aŭ futuro).

2^o – Ĉiuj aliaj temporilatoj, kiel ekzemple la antaŭpreterito, la antaŭfuturo, ktp, estas esprimataj per adverboj, konjukcioj, aŭ simple per la kunteksto.

3^o – La ses participoj, uzataj apud substantivo (resp. pronomo) aŭ apud la verbo 'esti', montras, en kia fazo de la ago troviĝas la subjekto, respektive la objekto: aŭ komencita aŭ ne finita (-ant, -at), aŭ finita kaj plenumita (-int, -it) aŭ ankoraŭ ne komencita sed intencata aŭ atendebla (-ont, -ot).

4^o – Sekve la formoj 'estas, estis, estos, estus estu, esti -ata' insistas pri la daŭro aŭ ripetiĝo de la ago; kaj la formoj 'estas, estis, estos, estus, estu, esti -ita' insistas pri la rezulto de la ago. La formoj kun '-ita' povas ankaŭ montri la antaŭtempecon en la okazo, se en la frazo estas tiurilata aparta indiko.¹⁸⁰

*

En la tempo de la voĉdonado pri la Rezolucio, la nombro de la akademianoj estis 43. El inter ili 21 respondis jese, 2 nee, sindetene 1. Kolektive rifuzis partopreni en la voĉdonado 6 akademianoj. Do, la Rezolucio ne estis akceptita, sed tiu neakcepto ne signifis la definitivon forĵeton de la *itisma sistemo*. La laŭnombrajn diferencojn inter la unua kaj la dua voĉdono influis, ke intertempe mortis tri akademianoj el la itista tendaro. Tiam 16 akademianoj prilaboris kaj proponis formulon por "provizora kompromiso" kaj postulis pri ĝi voĉdonigon de la *Akademio*. La prezidanto de la *Akademio* – opiniante, ke tiu "kompromiso" alportus nenian utilan ŝanĝon en la situacio – ne akceptis la proponon.

En 1967 la *Akademio* konsultis siajn anojn pri la signifo de kvar "testofrazoj", ĉu tiuj estas interpreteblaj *atisme* aŭ *neatisme*. Respondis 37 akademianoj, el kiuj 26 donis al la testofrazoj "itisman" sencon, 1 akceptis nur la sencon ĉe la kvar frazoj, 2 voĉdonis mikse, 2 sindetene, 6 rifuzis respondi, opiniante la demandojn ne klarajn aŭ maladekvate formulitaj (ĉi tiuj ankaŭ plue emfazis sian "atisman" konvinkitecon). La *Akademio* post la voĉdono tenas sin en sia lingvopraktiko al "itisma" uzado.

En tiu batalo Kalocsay luktis (kune kun Waringhien) ĉiam en la unua vico, malgraŭ, ke li devis konstati, ke lia VOJAĜO ne pruviĝis tiom efika, kiom li esperis de ĝi. Ankaŭ lia

sanstato subite tre malboniĝis. Li jam kalkulis eĉ la morton. Leterkopiaĵo konfesas pri tio (adresita al V. Sadler, datita la 11-an de marto 1967) jene:

"... Mi sciigas vin, ke mi tradukis dume du Ŝekspiraĵojn: SOMERMEZNOKTA SONGŔO kaj LA TEMPESTO. Ambaŭ estas senditaj al R. Rossetti, por ke li eventuale povu zorgi pri ilia eldono. Mi nome iros en hospitalon por verŝajna operacio, kaj se okazos al mi io fatala, mi ne povas mem plu zorgi pri tio, nek – dank' al Dio – pri ata/ita..."

Feliĉe Kalocsay postvivis la operacion kaj la 7-an de majo 1967 li skribis al Szilágyi:

"Tre kara Feri!

Mi jam staris supre ĉe la ĉielpordo, aŭ infre ĉe la inferpordo – mi ne povis distingi, sed oni elkriis, ke mi ricevis ankoraŭ prokraston, certe por ke ne malpliĝu la nombro de la itistoj en la Akademio... Kolektante tiom da forto, ke mi ree povu ĉirkaŭrigardi en la mondo kaj zorgi pri la plenumo de miaj devoj..."

Kaj Kalocsay zorgis plu ankaŭ pri la participa problemo. La 13-an de marto 1968 li skribis letere (bedaŭrinde oni ne povas centprocente konstati la adresiton, supozeble tiu estis Waringhien) jenon:

... Entute la 'atistoj' estas multe pli mobilaj ol ni: ili havas sian L.A.R. (Libera Akademia Rondo) kaj la Fondumon Esperanto, do senobstakle povas reagi al ĉio. Mi volonte farus saman fondumon, sed stencili kaj dissendi stencilaĵojn estas ĉe ni iom malfacila. Mi jam pensis pri tio, ke oni devus fondi F.A.R. (Fidela Akademia Rondo), ne por fari publikajn diskutojn, sed por diskuti interne de la Akademio. La estraro ne povas esti diskutpartnero de L.A.R., sed alia frakcio, F.A.R. povas rapide rebati je ĝiaj cirkuleroj. Mi nun rekonas, ke Vojaĝo taktike ne estas bona batalilo: ili povas el ties tro ampleksa materialo simple pretervidi la plej decidajn argumentojn kaj refuti elŝiritan frazon, kies senco estas tute alia izole ol en ilia loko... Mi multe pensis, ĉu uzi tonon ironian aŭ seriozan kaj mi opinias nun, ke oni devas esti objektivega, por gajni tiujn, kiuj estas neŭtralaj, aŭ montriĝis tiaj ĝis nun..."

La plano pri F.A.R. ne realiĝis. Tamen la antipodoj daŭrigis la diskuton. Neniu el la du skoloj cedis sian starpunkton, tamen la polemiko iom post iom mildiĝis kaj hodiaŭ jam ne temas pri ata/ita-batalo. Al la kvietiĝo certe kontribuis, ke la antipodoj dum la longdaŭra lukto elĉerpis ne nur la temon, sed ankaŭ siajn fortojn. Kalocsay dum la lastaj kvin jaroj de sia vivo apenaŭ partoprenis en la diskuto. Li luktis jam sur la batakkampo de la Esperanto-vortfarado, krome, certe li tiris la konkludon:

El atistoj fari itistojn estas preskaŭ neeble.

176 Ĝi aperis antaŭe en: MENADE BAL BŬKI BAL. Festlibro por la 50a naskiĝtago de Reinhard Hauptenthal. Saarbrücken: Edition Iltis, 1998. 487 p. (p.77-84).

177 Jung, Teo: La Plena Gramatiko de Esperanto. En: *Heroldo de Esperanto* 35. 1959:9 (1287), p. 1-2.

178 En: ... *kun siaspeca spico!* La Laguna: J. Régulo, 1971. 216 p. (p. 143). (Repr. Saarbrücken 1985).

179 Vilborg, E: Sciencfikcia vojaĝo tra tempoj kaj aspektoj. En: *La Espero* 55. 1967: 3-4, p. 26-27.

180 El: *Aktoj de la Akademio 1963-1967*. Rotterdam: UEA; Paris:SAT 1968. p. 43

11.3.3 Publikigaĵoj de Kalocsay pri -ata/-ita

Respondo al J. B. C.

LM 1925/septembro, interna kovrilpaĝo. Leterkesto. Anonime.

Ata kaj ita; Kompleksaj verboformoj.

LINGVO, STILO, FORMO. Studoj. Budapeŝto: Literatura Mondo, 1931. 142 p. (p. 83-86); Repr. Oosaka: Librejo Pirato, 1963; 3-a, parte tralaborita eldono. Oosaka: Librejo Pirato, 1970. 160 p. (p. 93-99.)

Pasivaj participoj; Verbotempoj kompleksaj.

ENCIKLOPEDIA de ESPERANTO. Red. L. Kökény, V. Bleier, I. Ŝirjaev. La Lingvofakon red. K. Kalocsay. Budapeŝto: Literatura Mondo 1933-1934. Du vol. 599 p. + 184 bildopaĝoj. (p. 433-434; 560). Repr. Budapeŝto: HEA, 1979. Sen bildoj.

Pri la pasivaj participoj.

Lingva Kritiko 1. 1932/35: 17, p. 2-3.

Pri la akordiĝo de postmetita particip-adjektivo. Respondo al s-ro E. E. Y.

Lingvo-Libro 1935:3, p. 152-154. (-y)

Pri la fina aspekto. Respondo al D-ro Tomaŝ Pumpr.

Lingvo-Libro 1937: 3-4, p. 10.

La verbo.

PLENA GRAMATIKA de ESPERANTO. La vorto kaj la frazo. 3. kompletigita eldono. Milano: Esperanto-Propaganda Centro, 1958. 181 p. (p. 132-170.)

Refoje: La kompleksaj verboformoj.

Heroldo de Esperanto 36. 1960:16 (1312), p. 3.

Paro en la parko aŭ la senco de l' prezenco. Letero de C. E. R. Bumy al K. Kalocsay.

LA ZAMENHOFA ESPERANTO. Simpozio pri -ata/-ita. La Laguna: Régulo, 1961. 329 p. (p.19-30.)

Letero al W. E. Collinson.

LA ZAMENHOFA ESPERANTO. Simpozio pri -ata/-ita. La Laguna: Régulo, 1961. 329 p. (p. 41-50.)

La waringhiena verbodivido

Esperantologio 2. 1959/61:2, p. 118-122.

La verbo. Konjugacio.

RENDSZERES ESZPERANTÓ NYELVTAN. Budapeŝto: Tankönyvkiadó, 1966. 244 p. (p. 68-73).

VOJAĜO INTER LA TEMPOJ. Gramatika studo. La Laguna: Régulo, 1966. 198 p. Vd p. 36-38.

Lingvaj problemoj en la Hungara Radio. (Intervjuo. Kalocsay kaj Tárkony respondas al s-ro Pusztai).

Hungara Vivo 8. 1968:4, p. 17-18.

La participa demando en la Akademio. Recenzo pri la Dokumentaro kompilita kaj komentita de E. Vilborg. 1973.

Hungara Vivo 15. 1975:2, p. 26.

Nekonataj tekstoj de Kálmán Kalocsay. Enkonduko kaj komentario de Reinhard Haupenthal.

1. Letero al akademiano Vilho Setälä (1967.02.23);

2. Cirkulero al la Akademianoj (1967.02.23);

3. Ekzameno de "Budapeŝta ekzameno" (manuskripto: 1968.03.13); vd p. 34-35.

4. Beaufront-reguloj (manuskripto: 1970.06.21).

En: Fonto 17. 1997:204, p. 3-13.

5. Profesoro Nro I. nomas en la satiro la "atismon" jam ne eraro, sed preskaŭ krimo. Iom poste li signas geste, ke itisto estas pli danĝera ol idisto. Tuj sekve li asertas, ke Zamenhof estis "pura itisto" (do pli danĝera ol idisto). Tia profesoro estas "neekzistanta afero", almenaŭ ekster frenezulejo.

6. Estas tute neeble, do "neekzistanta afero", ke Zamenhof ne sendus ĝentile de sur la katedro en la lernobenkon la profesoron, kiu diras, ke "krom turmenti" estas "infinitivo funkcia kiel nereakta adjektivo". Tiel same li povus paroli pri rekta kuproringo el ligno.

7. Estas tuta neeble, do "neekzistanta afero", ke Zamenhof ne protestus, se iu profesoro, kiel en la satiro, diras al li, ke "nia kara urbo" estas nepredikata verbo, ĉar ke "urbo" ne estas verbo, tiun scias ĉiu dek-jara lerneano. Bedaŭrinde, amiko Szathmári apartenas jam al la pli maljuna generacio.

El la sep punktoj sekvas, ke aŭ oni povas verki satiron pri neekzistantaj aferoj, aŭ "Budapeŝta Ekzameno" laŭ la opinio de ties aŭtoro ne estas satiro.

1. Amiko Szathmári demonstras, ke oni donas Budapeŝtan diplomon — almenaŭ provizore — al gramatika sensciulo.

2. Samtempe li demonstras tre konvinke — per nekono de la zamenhofa lingvouzo kaj per absurdaj miscitoj de gramatikaj terminoj — ke li estas gramatika sensciulo.

Konklude: amiko Szathmári volis verki skriban ekzamenon por pruvi sian gramatikan nescion kaj per tio akiri Budapeŝtan diplomon. Li havu ĝin.

Bp. 13.III.1968.

K. Kalocsay

181 La teatraĵeto estis surscenigita la 4an de aŭgusto 1966, dum la 51a UK en Budapeŝto, kaj prezentis ĝin la Teatrafako de LF-koop dum la *4-a Danuba Eperanto-Rendevuo* (Beograd, 1998). La teksto aperis en *Literatura Foiro* (1974:28, p. 8-14.) kaj sur E-Songazeto de LF-koop. Cetere Kalocsay tre ĉagreniĝis pro la teatraĵo de Szathmári.

11.3.4.1 Al Sinjoro Milton¹⁸²

Kara Sinjoro Redaktoro!

Mi sendas kritikan respondon al la satiro de mia amiko Szathmári, kaj mi esperas, kvankam ne firme, ke vi ĝin publikigos.

Mia espero baziĝas parte sur la redaktora rimarkigo "Ĉiuj kontribuaĵoj estas bonvenaj.", parte pro la granda komplezo, kion vi montris en via respondo al Waringhien.

La nefirmecon de mia espero kaŭzas, ke mia artikoleto iom odoras (bone aŭ malbone, tio dependas de gramatika gusto) itismon. Kaj publikigi tiaĵon en "atisma regiono" oni devas havi ne nur ordinaran civilan kuraĝon, sed rekte aŭdacon. Tion aŭdacon mi neniam spertis ĉe redaktoroj de la nomitaj regionoj, eĉ se ili mem estis sekretaj "itistoj".

Bona aŭguraĵo estas tamen, ke vi nomiĝas Milton kaj via glora samnomulo John Milton (1608-1674)¹⁸³ elmontris eksterordinaran aŭdacon per sia AEROPAGITICA.

Se malgraŭ tio vi rifuzas la publikigon de la artikoleto, mi tre petas: *bonvolu min sciigi pri tio poŝtkarte*. La rifuzon vi ne bezonas motivi. Vian komplezon mi klopodos rezervi.

Kun multaj salutoj

Bp. 13.III.1968. via sicere:

K. Kalocsay

182 Pri la sorto de la artikolo mankas indiko.

183 Kalocsay tradukis de Milton la poemon: *Al najtingalo*. Ĝi aperis en EB p. 98 kaj en TS p. 336.

11.3.5 VOJAĜO INTER LA TEMPOJ

Gramatika studo de K. Kalocsay.

La Laguna: J. Régulo, 1966.
22 x 16 cm, 198 p.

Al la "Akademia. triopo"

La verkon de V. Setälä, E. Vilborg, C. Stop-Bowitz: ESPERANTO — MODERNA LINGVO (pledas por la atisma sistemo) la itista tendaro konsideris kiel bonvenan por plua diskuto. Kalocsay entreprenis pritrakti la temon denove kaj detale.

La nun prezentita libro – skribas Kalocsay en la Antaŭparolo – estas propre respondo al la "akademia triopo"; ĝiaj paĝindikoj rilatas al ilia libreto. Sed mi ne volas fari batalskribaĵon: mi intencas funde pritrakti la problemon el ĉiuj imageblaj vidpunktoj...

La tono de tiu ĉi studo estas objektiva sen la antaŭaj ofendaj esprimoj kaj terminoj.

La libro havas 24 ĉapitrojn. En la unua ĉapitro Kalocsay prezentas la du sistemojn kaj la historion de la diskutoj. Kiam en 1961 aperis la SIMPOZIO, la atista tendaro riproĉos la aŭtorojn, ke ili pritraktas la temon unuflanke (el itista vidpunkto). La VOJAĜO el tiu vidpunkto ne estas riproĉebla, ĉar Kalocsay – krom la esploroj de T. Pumpr, R. Schwartz, De Hoog kaj la *Verbodivido* de G. Waringhien (simpoziistoj) – prezentas ankaŭ la tezojn de la alipartianoj. Li pritraktas la tezojn kaj teoremojn de W. Verloren van Themaat, E. Vilborg, C. Stop-Bowitz, J. Degenkamp, L. Mimó, T. Jung; prezentas la vidpunkton de P. Lobut kaj la postulaton de W. E. Collinson.

Jen la ĉapitroj de la libro:

Perfektiveco absoluta aŭ relativa; La signifo de la verbaj finaĵoj; La priparolata tempo; La simetrio; La participoj en la konjugacio; La spegulo de la triopismo; La spegulo de la simpoziismo; La zamenhofa pasivo; La Ekzercara pasivo; Resuma retrorigardo; La mito pri lingvo de moderna tipo; Strukturoj de pasivo; La pluskvamperfekto; Ree pri la perfektiveco; Aspektoj, gradoj, statoj; La verbotempoj en la subpropozicioj; La tri gradoj en la praktiko; Indiko de agotempo; Ĉu reformi? Ĉu kompromisi?; Resumo kaj epilogo.

En ili Kalocsay funde analizas ĉiujn tiklajn, diskutitajn punktojn; ĉiujn nuancojn de la temo. Li faras komparaĵojn kun la latinidaj, slavaj kaj germanaj lingvoj.

En VOJAĜO Kalocsay volis pruvi, ke *la simpoziismo neniel estas kontraŭa al la 6-a paragrafo de la FUNDAMENTA GRAMATIKO* (kion la antisimpoziistoj asertas); ke la simpoziismo estas logika, kiun pravas analogioj de aliaj lingvoj, kiuj esprimas la pasivon per participo kaj helpverbo "esti"; kaj ne lastfoje, ke en la EKZERCARO de Zamenhof troviĝas simpoziismaj frazoj, sekve Zamenhof praktikis elskluzive simpoziismon.

Mi tre ĝojus – finas la studon Kalocsay – se mia traktato, al kiu certe ne mankas la detaleco kaj amplekseco postulataj de Vilborg, estus akceptita kiel finofara lingvistika esploro. Kaj mi tre ĝojus, se la legantoj kaj la konsultantoj trovas en ĝi utilan vojmontranton en sia vojaĝo inter la tempoj.

La recenzoj pri la libro, la daŭra polemiko pri la problemoj de la participoj montras, ke per tiu verko Kalocsay ne sukcesis el *atistoj* fari *itistojn*, tamen li esperis ke la analizo eble instigos la antipodojn kaj hezitatojn por revizii siajn teoriojn.

11.3.5.1 Esenca bibliografio

- F. S(zilágyi): *La granda vojaĝo en partikipujo*.
NP 1966:3, p. 189.
- Vatré, H.: *Vojaĝo inter la tempoj*.
Svisa Espero 1966:6, p. 5.
- Devis, J.: *Vojaĝo inter la tempoj — K. Kalocsay*.
Boletín 1966, novembro-decembro, (158), p. 11-12.
- Kruit, W. F.: *Vojaĝo inter la tempoj*.
Sennaciulo 1967:1, (740), p. 8.
- Gregor, D. B.: *Vojaĝo inter la tempoj de K. Kalocsay*.
TBE 1967: januaro, (729), p. 13-15.
- Botos, I.: *Vojaĝo inter la tempoj*.
HV 1967:1, p. 24.
- Collinson, W. E.: *K. Kalocsay: Vojaĝo inter la tempoj — gramatika studo*.
HdE 1967:2, (1429), p. 3.
- Herrmann, W.: *Vojaĝo inter la konjugaciaj tempoj*. Pri la gramatikaj studoj de T. Jung kaj K. Kalocsay.
GER 1967:2, p. 15-16.
- Sadler, V.: *Pri la nova libro de Kalocsay. Vojaĝo inter la tempoj*.
Esperanto 1967/46.
- Drs. F. R.: *Prof. Dr. Kálmán Kalocsay: "Vojaĝo inter la tempoj"*.
Sonorilo 1967:2, p. 22-24.
- G. J. D(egenkamp): *Vojaĝo inter la tempoj*.
NE 1967:marto, p. 28-29.
- Vilborg, E.: *Sciencfikcia vojaĝo tra tempoj kaj aspektoj*.
LE 1967:3-4, p. 26-27.
- Anonime: *Vojaĝo inter la tempoj*.
The Aŭstralian Esperantist 1967:junio, (139), p. 177.
- Atanasov, D. A.: *Vojaĝo inter la tempoj*.
NB 1967:8, p. 53.
- Maynar, E.: *Komentario pri "Vojaĝo inter la tempoj"*.
Boletín 1967:28, p. 15-16.
- Vilborg, E.: *La "Vojaĝo" de Kalocsay*.
En: LA PARTICIPA PROBLEMO EN LA AKADEMIO.
Dokumentaro kompilita kaj komentita de Ebbe Vilborg.
Göteborg: Lingva Komisiono, 1973. 138 p. (p. 93-98.)

1.3.5.1.0 Notoj kaj referencoj

- TBE 1966:decembro, (728), p. 459.
Fonto 1999:220, p. 6, Berveling, G.
Ĉi-libre: p. 28, 30-31, 32

11.3.6 Kiu kaj kial murdis la itistan Grammat?¹⁸⁴

Temas pri riĉa kaj fama esperantisto Grammat, kiu estas murdita per papertranĉilo. La detektivoj esploras pri nekonata murdisto.

La fadenoj kondukas en multajn direktojn: venĝo de forlasita fianĉino, aviduloj por heredaĵo, neleĝa filo vivante mizere, delonga malamikeco kun envia najbaro ktp.

La detektivlaboro fiaskis. Fine juna esperantisto malkovras, ke la murdinto estas samideano, la plej bona amiko de Grammat.

Kiel? — Ili ambaŭ estis *ĝisostaj artistoj* (simetriuloj), sed Grammat konvertiĝis al *itismo* (aspektismo) kaj tion li konfesis al sia amiko kune kun la decido deklari la aferon publike. Tiam la amiko pro senbrida furiozo trapikis la koron de Grammat.

(Laŭ postlasita manuskripto de Kalocsay)

184 Skizo de elcerbumita krim-romano de Kalocsay. Ĝi aperis unuafoje en DIINO p. 6.

11.4 LA VORT-TEORIO EN ESPERANTO¹⁸⁵

11.4.1 La "amata ĉevaleto" de Kálmán Kalocsay

Apud la diskuto pri la neologismoj kaj la participa problemo en Esperanto, la vortfarado estis tiu polemiko, en kiun ĵetis sin Kalocsay per la tuta spirita kaj korpa forto.

La diskuto pri la Esperanta vortfarado fontis el la fakto, ke ties teorion Zamenhof ne fiksas en reguloj, nur montris per ekzemploj. Pasis jam jardekoj post la eksplodo de tiu lingva milito, tamen la oponentoj ne venis al konsento. La historion de la malkonkordo Kalocsay skizas jene:¹⁸⁶

"En la unua jardeko de nia jarcento la esperantistoj trankvile uzis sian lingvon laŭ la famaj dek ses reguloj, kiuj havis emon kaj motivon ankaŭ ekzemple entuziasmi pro la Hamlet-traduko de Zamenhof kaj precipe pro la kongreso en Bulonjo-sur-Marco en 1905, kiun multaj nomis la mirakla, nova verda Pentekosto. Sed, ho ve, tiun paradizan idilion, laŭ la antikva recepto, fuŝis la diablo. Ne por pomomanĝo li tentis, sed ĵetis inside inter la esperantistojn la nigramagian frapvorton 'returnebleco', asertante, ke sen tiu sorĉa havindaĵo Esperanto estas logistike neakceptebla. Tiu diablo konsistis el la malsankta Duunuo L. Couturat kaj L. Beaufront."¹⁸⁷

Kio estas tiu 'returnebleco'?

Ĝi signifas, ke post ŝanĝo kaj reŝanĝo de finaĵo oni devas ricevi la saman vortkategorion. Por kompreno helpas ekzemploj:

En Esperanto ekzistas la verboj *adresi, sangi, marteli*, sed se oni reŝanĝas la finaĵon, oni venas ne al la nomo de tiuj agoj, sed al la nomo de la konkretaĵoj *adreso, sango, martelo*. Logistike, oni devas formi la verbojn *adresizar, sangifar, martelagar*, ĉar per ilia substantivigo ni ricevos la agonomijn *adresizo, sangifo, martelago*.

Ĉi tiun principon kreis Louis Couturat, profesoro de la logistika filozofio kaj verkinto, kune kun Léopold Leau, de ampleksa libro pri planlingvoj.¹⁸⁸ Lia komplico L. de Beaufront estis la unua gramatikisto de Esperanto kaj ĝis tiam decida defendanto de la Zamenhofa lingvo; li estis nomata eĉ "dua patro de Esperanto".¹⁸⁹ Du grandaj aŭtoritatoj! Kaj ili volis akumuli ankoraŭ pli da aŭtoritato. Couturat fondis la Delegitaron por la Alpreno de Internacia Lingvo kaj sukcesis por ĝi varbi dekvar bril-famaj scienculojn, inter ili kvar lingvistojn: O. Jespersen, G. Peano, J. Baudouin de Courtenay kaj E. Boirac, krome la tre renoman fiziko-ĥemiiston W. Ostwald. Tiu Delegitaro, sed propre nur Couturat kaj de Beaufront, akceptis Esperanton, sed kun ŝanĝoj (vort-sistemo de Couturat, leksikaj ŝanĝoj de Beaufront). Zamenhof rifuzis la ŝanĝojn. Tiam Couturat kaj de Beaufront publikigis la ŝanĝitan lingvon sub la nomo *Ido, lingvo de la Delegitaro*.¹⁹⁰

La nomo pruviĝis por bona reklamo sugestante, ke tiu estas kvazaŭ filo, plibonigita formo de Esperanto. W. Ostwald oferis grandan parton de sia Nobel-premio por la nova entrepreno kaj tiel povis aperi abunde lernolibroj, vortaroj, propagandaj broŝuroj kaj gazetoj.

La apero de Ido estis granda danĝero por Esperanto. Plurajn imonis la logistika scienceco de la vortosistemo kaj la famaj nomoj de la Delegitaro.¹⁹¹ Th. Cart kaj aliaj fideluloj de la Zamenhofa lingvo klopodis firmigi la konsciencojn de esperantistoj kontraŭ la idistaj tentoj.

Tamen multaj, ankaŭ inter la fideluloj dubis: ĉu Esperanto fakte havas vortosistemon starigeblan kaj konfirmigeblan?

Tiu ĝeno daŭris ĝis 1910, kiam René de Saussure aperigis sian studon sub titolo *La logika bazo de la vortfarado en Esperanto* subskribitan per pseŭdonimo ANTIDO.¹⁹² Li faris klaran formulon de la vortfarado baze de la radik-karakteroj, t.e. ke la radikoj en Esperanto havas jam en si mem fiksitan karakteron: *substantivan, adjektivan kaj verban*. La vort-teorio de Saussure klare montris la perfektan logikecon kaj naturecon de la Esperanto-vortderivo kontraŭe al la deriv-reguloj de Couturat, kies sistemo trudus arbitrajn pezecon,

ne naturecon al Esperanto.

Saussure sendis sian verkon *La konstruktion logique des mots en Esperanto* al Zamenhof, kiu aprobe respondis al la propono.¹⁹³

Post la apero de la Saussure-a studo estis multe pli facile resti esperantisto. Tiom pli, ke post la elĉerpiĝo de la Ostwald mon-helpo la Ido-movado komencis stagni. La vivo de Ido ŝanĝiĝis je klopodplena vegetado...¹⁹⁴

*

La demando de la Esperanta vortosistemo estis favorata temo de Kalocsay, kiel li diris "mia amata ĉevaleto". Probable lia unua ĉi-tema studeto aperis jam en 1923 en la poŝlibro *Vortaro de oficialaj radikoj en Esperanto* de D-ro Vince Tóth. Ĉi tiu studeto klare montras, ke Kalocsay akceptis la tezon de Saussure kaj apogis sin al lia libro: *La vortteorio en Esperanto*. Bern 1914. En la libro li faris multajn substrekojn kaj marĝenajn notojn per ruĝa inko.

En la XLV-a rondelo de RIMPORTRETOJ Kalocsay konstatis:

*Saussure, — la pura, klara Mens'
La projektinto, projektonto.
Trabilis, kvazaŭ lumofonto,
La vortstrukturon lia Lens'.*

En 1931 aperis LINGVO, STILO, FORMO, en kiu Kalocsay detale pritraktas la Esperanto-vortfaradon.

"*Cetere en ĝi troviĝas neniam novismo aŭ reformo – rimarkas li enkonduke – ĝi estas sola la interpreto de la lingvouzo. Ankaŭ la ĉefaj principoj ne estas novaj, ili estas troveblaj ĉe de Saussure kaj Wüster. Nova estas sola la malkovro de la 'vort-efiko' per kies apliko, laŭ mia opinio oni povas klarigi la esencon de la vortfarado en Esperanto kaj pruvi la plenan unuecon de la vortderivo kaj vortkunmeto.*"

Do la malkovro de Kalocsay estas la t. n. 'inversa vortefiko', kies esenco estas, ke ĉe duobla flankelemeno ne nur la dekstra elemento povas difini la vortkarakteron de la maldekstra elemento, sed ankaŭ la maldekstra elemento povas efiki al la dekstra, difinante ties vortkarakteron. Jen ekzemploj de Kalocsay:

Adjektiva aŭ prepozicia maldekstra elemento efikas substantivige: *grandkuraĝa* =(granda kuraĝo)-a = karakterizita granda kuraĝo; *senutila* = (sen utilo)-a. Verba prefikso kiel maldekstra elemento efikas verbige: *reformo* = (re-formi)-o. Tio estas, la 'inversa vortefiko' povas estigi plurala aŭ substantiva senco de elemento kaj per tio la finaĵo povas roli kiel memstara. Ekzemple: en *triangulo tri sence* pluraligas la elementon *angulo* kaj memstarigas la o-finaĵon laŭ strukturo (*tri anguloj*)-o = *triangulaĵo*. Tiel same: *senforto* = (sen forto)-a = *senforteco*; *senpova* = (sen povo)-a = *senpoveco*. Tiujn formojn oni nomas *streĉitaj formoj*. Pri la vortteorio de Kalocsay donas detalan klarigon la *Plena Gramatiko de Esperanto* (1935, 1938) en kiu ĝi ampleksas 156 pagojn. La libron (verkitan kun G. Waringhien) la eldonisto V. Bleier sendis al ĉiuj akademianoj por kritiko.

Pluraj opiniis, ke la aŭtoroj blinde lasis sin gvidi de eraraj opinioj starigante la ĉefajn regulojn de la vortfarado kaj ilin sistematigis tiel arbitre, ke la starigita konstruaĵo eĉ per bonegaj materialoj ne povas esti rekomendita por la lernado de Esperanto. Aliaj plendis pri la komplikeco de la Kaloĉaja tezo.

La alvenintajn kritikojn la redaktoroj de *Literatura Mondo* publikigis en la kvarmonata gazeto *Lingvo-Libro* kaj samtempe Kalocsay defendis la atakitajn punktojn de sia sistemo.¹⁹⁵

Literatura Mondo en 1938 eldonis broŝuron sub titolo *La gramatika karaktero de la Esperantaj radikoj*. Enkonduke Kalocsay informas la legantojn, kiel la temo venis denove sur tablon:

"La Prezidanto de la Esperanta Akademio entreprenis la redakton de la *Oficiala Vortaro de Esperanto*. Li intencis en tiu vortaro marki ankaŭ la gramatikan karakteron de la radikoj, signante, ĉu ili estas *substantivaj, adjektivaj* aŭ *verbaj*..."

Kontrŭ tiu tezo leviĝis kontraŭdirantoj, kiuj rifuzis kaj rifuzas, ke en Esperanto la radikoj havas karakteron en si mem. Ili opiniis, ke la radikoj estas senkarakteraj stumpoj, kies sencon kaj karakteron donas sole la finaĵo. Do, reviviĝis la diskuto pri la vortfarado, sed la polemikon interrompis la dua mondmilito.

La polemiko ekflamis denove en la sesdekaj jaroj, kiam la Akademio de Esperanto – okaze de la sesdeka datreveno de la oficialigo de la *Fundamento* entreprenis sur la gramatika tereno esploradon pri kelkaj demandoj, inter ili pri la vortfarado en Esperanto.

En la *Aktoj de la Akademio* (1963-1967, p. 58-78) D-ro A. Albault kiel direktoro de la Sekcio pri la Ĝenerala Vortaro prezentis studon sub titolo *La vortfarado en Esperanto* (redaktitan en kunlaboro kun K. Kalocsay) kaj proponis voĉdonon pri la sistemo.

"... Estis la merito de nia eminenta Kolego Kalocsay – skribis D-ro Albault – plene ellabori tiun teorion (en *Lingvo. Stilo, Formo*, kaj poste en *Plena Gramatiko de Esperanto* kunlabore kun G. Waringhien). Saussure serĉadis la ĝustan vojon kaj devis argumenti unue kontraŭ Couturat kaj pli poste kontraŭ la internaj oponentoj al lia teorio. Kalocsay feliĉe povis flankenlasi tiajn zorgojn kaj prosperis al li elĉizi novan formon de la sama teorio, klaran kaj spirito-kontentigan, senbalastigitan je ĉiuj flankaj konsideroj. Liaj distingo de la rekta kaj de inversa vortefiko estas, interalie, notindaj.

Nun ni estas en tia stato, ke ni posedas elprovan teorion, kiu fidele klarigas, kiel estas formitaj – kaj plu ĉiutage formataj – la vortoj uzataj de Zamenhof kaj de la bonaj aŭtoroj. Plie ĉiu nunaj uzantoj de la lingvo, se nur ili korekte lernis ĝin, skribe aŭ parole formas la vortojn laŭ la principoj de tiu teorio, eĉ se ili ne studis aparte tiujn ĉi. Kaj tie ĉi oni ne povas tro emfazi, ke ne temas, kiel ĉe Couturat, pri reguloj arbitre elpensitaj, laŭ iuj 'logikaj' modliloj, sed tute male, ke temas pri konstatoj, pri reguloj science ekstraktitaj el la lingvo mem, kia oni ĝin uzas skribe kaj parole..."

La Sekcio pri la Ĝenerala Vortaro en 17 punktoj resumis siajn *Konstatojn* pri la ĉefaj trajtoj de la Esperanto-vortfarado. Pri tio voĉdonis 33 akademianoj: el ili jese 28, nee 1, sindetene 4.

La Akademio de Esperanto aprobe konsiderinte la *Konstatojn* de la Sekcio pri la ĝenerala Vortaro en 6 paragrafoj rekomendas la principojn de la vortfarado.

La *Rekomendoj de la Akademio* en si mem ne povis krei la dezirindan harmonion.

La Kaloĉajan analizadon multaj trovis "peza". Fakte la vortefiko kaj inversa vortefiko estis *tro peze digestebaj* – kiel diris poste Kalocsay – *ankaŭ por la akademiaj kapoj*.

Pri la demando de la Esperanta vortfarado la oponentoj ne venis al konsento. Kvankam D-ro P. Janton, profesoro ĉe la Universitato de Clermont-Ferrand en sia artikolo *Pri Esperantaj Radikoj*¹⁹⁶ emfazas, ke li ne deziras reveki la delonge paciĝintan disputon pri la Esperantaj radikoj, tamen lia verko *L' Espéranto* (Paris 1973) akcelis la disputemon de la oponentoj, ĉar P. Janton ne konsentis la *Konstatojn* kaj *Rekomendojn* de la Akademio de Esperanto.

D-ro István Szerdahelyi sub titolo *La karaktero de vortelementoj de Esperanto* pritraktis la temon,¹⁹⁷ sed liajn tezojn Waringhien kaj Kalocsay refutis.¹⁹⁸

Do malgraŭ la paca intenco de P. Janton la diskuto denove ekflamis.

L. Tárkony sub titolo *La bros-problemo* skribis:¹⁹⁹

Literatura Foiro preskaŭ eksplodas pro la 'bros-problemo'. Temas pri tio, ĉu bros estas *substantiva* radiko, aŭ *verba*; lastokaze oni devas brosi ne per broso, sed per brosililo.

Mi trovas nur stranga la grandan ekscitiĝon ĝuste pri *bros*, ĉar temas pri io tute alia: ĉu la radikoj havas gramatikan karakteron aŭ ne. Szerdahelyi asertis, ke ili ne havas tian karakteron, kaj ke ties konstato fundamente ŝanĝas la direkton de la scienca esploro de Esperanto. La reago je tio koncernis ne la kompatindan broson, sed ĉi tiun novan ĝeneralan konstaton. Nun tamen la redakcio deklaras, ke la laboro de Szerdahelyi havis

ĝis nun esploran signifon kaj li ankoraŭ ne atingis definivan rezulton. Mi oponias, ke per tiu ĉi "prudenta deklaro" trankviliĝos la tuta afero."

La diskuto pri la vortosistemo de Esperanto en 1975 kvietiĝis. La "trankviliĝon" estigis ne la "prudenta deklaro" de la redakcio de *Literatura Foiro*", sed la forpaso de Kálmán Kalocsay.



Vortfarado en la lingva laboratorio de De Saussure
Kalocsay akceptis liajn tezojn.

(Karikaturo de Jean-Robert, aperinta
en la kolora poŝtkart-serio en 1914)

*

L. Kapitány en la mezo de oktobro 1975 faris surbendigitan intervjuon kun Kalocsay.²⁰⁰
Interalie Kalocsay diris:

"... Mi okupiĝas pri la vortkunmeto kaj vortfarado en Esperanto, ĉar ĝuste tiu unu triono de la *Plena Gramatiko*, kiun la karmemora Stefano La Colla jam ne povis eldoni. Do mi

faras nun tiun parton de la gramatiko por la *Budapeŝta Informilo* kaj eble ankaŭ por aparta eldono. Estus bone, se ĝi restus eternigita ankaŭ en libroformo..."

Se Kalocsay estus vivanta, certe li ĝojus vidante sian definitive prilaboritan vort-teorion aperigitan en DEK PRELEGOJ (1985), p. 6-37.

185 Ĝi aperis antaŭe en la *Festlibro por la 75a naskiĝ-tago de D-ro André Albault — De A al B*. Edition Iltis 2000. 281 p. (p. 67-73).

186 Fragmentoj el la studoj de Kalocsay.

187 K. Kalocsay: *Dek Prelegoj*. Budapest: Hungara Esperanto-Asocio 1985. 126 p.

188 *Histoire de la langue universelle*. Paris: Hachette 1903. XXX. 576 p. — *Les nouvelles langues internationales*. (Coulommiers: Brodard 1907.) VIII, 110 p. Repr. de ambaŭ Hildesheim, New York: Olms 1979.

189 Post la malfideleco oni nomis lin Judaso.

190 Ido estis komence la pseŭdonimo de Beaŭfront, kiu nomis sin kiel idon de Zamenhof nur poste, aliaj provoj (ILO, ktp) ĝi tranpasis al la lingvo, same kiel la nomo "Esperanto" pasis al la zamenhofa lingvo.

191 El la delegitaro post nelonge eksigis la kvar lingvistoj: Jespersen kaj Peano kreis propran lingvon, kaj la aliaj du revenis al Esperanto.

192 La pseŭdonimo "Antido" signifas — laŭ la propra klarigo de Saŭsure — ne "anti-ido", sed Esperantido, kvazaŭ kompromiso inter ambaŭ.

193 Kp. korespondaĵo *Pri la logika bazo de la vortfarado en Esperanto*. En: *Internacia Scienca Revuo* 7. 1910.82, p. 271-272. — Repr. en: *OVV* 49, p. 455.

194 Estas sciata, ke en 1912 dum certa tempo Kalocsay okupiĝis pri Ido. Pri lia "idistiĝo" jen lia deklaro: "...miaj lingvistikaj interesoj ne lasis min ripozi. Avide mi legis ĉion rilantan al lingvaj problemoj, mi kritikis la lingvon, havis reformideojn, kaj fine bele mi atingis la blujn bordojn de Ido. Mi lernis ĝin. Poste mi komencis fari verstradukojn, samtempe en Esperanto kaj en Ido. Surprizis min la granda natureco, fleksiĝemo, elasteco, versebleco de Esperanto dum Ido mi trovis nenatura, rigida, seka, artifika. Ofte mi devis fari kiel poezian permeson, deflankiĝon de la rigidaj Idaj derivreguloj kaj per tio nevole reveni al Esperantaj formoj. Fine, kiam mi eksciis, ke mia Ido estas jam ne ekzistanta lingvo, ĉar dumtempe oni definitive fiksas Ido en alia formo ol mi lernis ĝin en mia lernolibro, mi decidis ne lerni plu ĉi tiun novan formon kaj resti definitive esperantisto..." (Kiam, kial kaj kiel mi lernis Esperanton?) En: *Hungara Heroldo* 3. 1930:4, p. 3-4. — Repr. en: *Bulteno* (HEK) 1958:4, p. 83 kaj en *Eventoj* 1992:4, p. 10.

195 Vd la bibliografion.

196 En: *Heroldo de Esperanto* 48. 1972:4-5 (1521-1522), p. 3.

197 En: *Literatura Foiro* 5. 1974:23, p. 8-10; 24 p. 5-9. La brosproblemo. 5. 1974:28, p. 16-19.

198 Kalocsay: La karakteroj de vortelementoj en Esperanto. En: *Literatura Foiro* 1975:29, p. 11-14. Waringhien en *Literatura Foiro* 1975:31-32, p. 12.

199 L. Tárkony: Revuoj de revuoj. En: *Hungara Vivo* 1976:1, p. 18..

200 Poste aperigita en *Monda Karuselo* 1980:16, p. 3-6.

11.4.1.1 Studoj kaj artikoloj de Kalocsay pri la vortosistemo de Esperanto

Suplemento.

En: Tóth, V.: AZ ESZPERANTÓ HIVATALOS SZÓGYÖKEINEK SZÓTÁRA.(Vortaro de oficialaj radikoj de Esperanto). Budapest: Hungara Esperanto-Instituto, 1923, 1930, 1937. 128 p. (p. 115-126).

Recenzo pri la verko de E. Wüster: LA OFICIALA RADIKARO.

LM 1923/118-119. Kopar.

Eszperantó-szóalkotás.

En: L. Kökény: MAGYAR ESZPERANTÓ ÉVKÖNYV. I. Évfolyam. Budapest: *Hungara Heroldo* 1930, p. 11-12.

Esperanta vortfarado.

En: LSF p. 7-43. Repr. en: ESPERANTO. LINGVO, MOVADO, INSTRUADO. Red. D. Blanke. Berlin: Kulturbund der DDR, Zentraler Arbeitskreis Esperanto, 1977. 187 p. (p. 51-82.)

Kategorio-sufikso.

En: EdE p. 280-281.

Verbigo senpera

En: EdE p. 559-560

Vortfarado.

En EdE p. 564.

Vortkunmeto en Esperanto.

En: EdE p. 565-566.

Vortfarado. Vorto kaj frazo.

En: PG p. 22-135.; en: II-a tralab. eld. p. 28-156.; en: 4. tralab. eld. PAG p. 367-528.

Pri la PLENA GRAMATIKO.

Respondoj de Kalocsay al Leo Belmont (LB), William Bailey (WB), Vicente Inglada (VI), E. Marcelé (EM), kaj M. Rollet de l'Isle (MRI).

En: *Lingvo-Libro* 1936:1, p. 8-9 (LB), p. 10 (WB); 2, p. 3-13 (VI), 3, p. 3 (WB), p. 3-10 (VI); 1937:1, p. 3-4 (WB, EM); 2. p. 2-4 (EM); 3/4, p. 2-4 (EM); 1938:1, p. 6-8 (MRI).

Ho, tiu vortkunmeto...

En: AD p. 46-58.

LA GRAMATIKA KARAKTERO DE LA ESPERANTAJ RADIKOJ. (Teorio kaj praktiko).

Budapest: *Literatura Mondo*, 1938. 20 p.; Repr. en: *American Esperanto Magazine* 77. 1965:10-12, 20 p.; Repr. Saarbrücken: Iltis, 1980. 20 p.

Radika transitiveco. (Respondo al Paul Nylén).

LM 1947/58-59. Alex Kay.

Respondo (al Paul Nylén).

LM 1947/186-187).

Respondo (al Paul Nylén. **Ankoraŭ pri la radika transitiveco**).

LM 1948/58-59

Respondo. (Al Wilhelm Th. Oeste. **Pri la kunmetaĵoj**).

LM 1949/122.

Vortfarado.

En: RENDSZERES ESZPERANTÓ NYELVTAN. (Sistema Gramatiko de Esperanto).

Budapest: Tankönyvkiadó 1966, 1968. 243 p. (p. 201-209).

Pri la vortosistemo de Esperanto.

Budapeŝta Informilo 6. 1975:2, p. 21-22 (I.); 3, p. 21-22 (II.); 4, p. 17-18 (II.) [=III.]; 6, p. 13-14 (IV.); 7/8, p. 18-19 (V.); 9, p. 18-19 (VI.); 10, p.14-15 (VII.); 11, p. 14-15 (VIII.); 12, p. 14-15 (IX.). Poste en: *Sciencaj komunikaĵoj*. Aldono al *Budapeŝta Informilo*. 1977:Julio, p. 7-22; En: DEK PRELEGOJ. Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1985. 126 p. (p. 9-37).

La karaktero de vortelementoj en Esperanto.

Literatura Foiro 6. 1975:29, p. 11-14.

Lingvo kaj logiko. (Recenzo pri L. Mimó: LERNOLIBRO DE ESPERANTO).

Hungara Vivo 15. 1975:1, p. 18.

Lingvo kaj logiko. (Respondo al la protesta letero de L. Mimó).²⁰¹

Hungara Vivo 1976:1, p. 19.

201 Lasta artikolo de Kalocsay, kies pres-provon li ankoraŭ korektis.

11.4 2 Rimarkoj pri la vortteorio de K. Kalocsay

Ne estas la celo de ĉi tiu mallonga kontribuo pritaksi la teorion pri la vortfarado de Esperanto, kiu estis en sia bazo ellaborita de René Saussure (i. a. LA CONSTRUCTION LOGIQUE DES MOTS EN ESPERANTO, Genève 1910, kaj FUNDAMENTAJ REGULOJ DE LA VORTTEORIO EN ESPERANTO, Bern 1915), pluevoluigita de Eugen Wüster kaj fine sisteme prilaborita de K. Kalocsay, kio aperis en LINGVO, STILO, FORMO (Budapest 1931) kaj pli detale en la PLENA GRAMATIKO de ESPERANTO (1935, en *Literatura Mondo*, Budapest, p. 22-135). En la eldono (Budapest, 1938, p. 28-156) la ĉapitroj estas iom poluritaj kaj pliprecizigitaj sed ne ŝanĝitaj laŭ esence. Dum la lastaj jaroj de sia vivo Kalocsay denove prezentis sian sistemon en *Budapeŝta Informilo* (1975, n-roj 2-12), kaj ĝi represiĝis en DEK PRELEGOJ de K. KALOCSAY (Budapest, 1985).

La literaturo pri la vortteorio de Esperanto estas tre riĉa. Ĝis la nuntempo la polemiko pri ĝi ne ĉesas kaj lastatempe denove ekflamiĝis, inter alia per la kontribuoj de I. Szerdahelyi (ekz. en *Literatura Foiro* n-roj 23, 24, 28, 31-32). Tiun polemikon parte partoprenis Kalocsay mem.

La kritikon de la lingvistoj i. a. provokis la fakto, ke Kalocsay uzis sufiĉe nekutiman terminologion, kvankam li povintus konsideri iun en la diversaj, kiuj uziĝis, respektive uziĝas en la lingvoscienco.

Li tion ne faris. Sed tio ne malhelpu sobran aliron al la bazaj konstatoj de lia teorio pri vortfarado. Ĉar kritikante ĝin, eble tro facile oni "forfluigas la infanon kun la bano". Ne estas mia celo partopreni en la polemiko. Mi volas simple nur komuniki sperton, kiun mi faris kun lia sistemo komparante la vortfaradojn de la germana kaj Esperanta lingvoj. La komparo de tiuj lingvoj estas alloga, ĉar ili estas diverstipaj (la germana = precipe fleksia, Esperanto = precipe aglutina) kaj tamen ambaŭ treege vortkunmetemaj.

Laŭ la teorio de la konfronta lingvistiko (ankaŭ "kontrasta lingvistiko") oni komparas lingvojn, ĉu geneze parencajn, ĉu ne parencajn, en sinkrona rigardo. Tamen la "komparebleco" de la komparotaj lingvoj ne ekzistas aŭtomate. Kondiĉo por ĝi i. a. estas la ekzisto de certa evoluintenco de ambaŭ lingvoj laŭ morfologia kaj semantika kriterioj. Krome la konfrontado ne povas anstataŭi priskribadon de la lingvoj. Ambaŭ komparotaj lingvoj jam devas esti sufiĉe priskribitaj, kaj, tio gravas, surbaze de samaj aŭ similaj (almenaŭ intersimiligaj) metodoj. Jen la problemo: Ĉu la modernaj lingvistikaj metodoj uzitaj por prezenti la mekanismon de la vortfarado en la germana lingvo estos iom adekvate kompareblaj kun la sufiĉe malnova kaj eĉ nelingvistika prezentomaniero de la vortfarado de Esperanto fare de Kalocsay? Ĉu entute ambaŭ vortfaradoj estas kompareblaj? Kompreneble necesis trovi unuecan terminologion kaj prezentomanieron (metalingvon) por priskribi samtempe la fenomenojn de la vortfarado en ambaŭ lingvoj. Kaj jen oni devas substreki, ke la Kalocsay-a sistemo tion, en neatendita grado, faciligis. Multaj prezentoprincipoj troveblaj en la moderna verko pri la germana vortfarado de Wolfgang Fleischer (*WORTBILDUNG DER DEUTSCHEN GEGENWARTSSPRACHE*, Leipzig, 1974)¹ estis, surprize, similaj al tiuj, kiujn uzis Kalocsay en la PLENA GRAMATIKO de ESPERANTO. Jen kelkaj ekzemploj pri terminoj:

Kalocsay Fleischer Ekzemplo

lingvoelementoj morfemoj (Morpheme) be/grad/ig/en, rekt/ig/ad/i

radikoj bazaj morfemoj (Grund- /dom/ /haus/
morpheme)

finajbezonaĵoj ligitaj morfemoj (gebun- kur-i/lauf-en
elementoj dene Morpheme)

solstariva liberaj aŭ neligitaj pro, kaj/ für, und
elemento morfemoj (freie Morpheme)

sufiksoj derivaj sufiksoj (Ableitungs- -um-, -ist-/ -heit²⁾
suffixe -ler

prefiksoj prefiksoj (Präfixe) dis-, re-/ zer-, wieder-

sufiksoidoj duonsufiksoj (Halbsuffixe) -il-, -estr-/ -mäžig-²⁾
-werk

Kompreneble ekzistas kelkaj gravaj diferencoj:

Ekz. la finaĵbezonateco de la bazaj morfemoj en ambaŭ lingvo malsamas. Ankaŭ necesis alia grupigo de prefiksoj/prefiksoidoj kaj sufiksoj/sufiksoidoj en Esperanto por fari ilin kompareblaj kun la germanaj cirkonstancoj, kie la duonsufiksoj (Halbsuffixe) pleje, sed ne tute, respondas al la sufiksoidoj laŭ la klasifiko de Kalocsay.

Ankaŭ la kompreno de la gramatikaj finaĵoj kiel vortkategoriaj sufiksoj kun gramatika kaj leksika signifoj estis utila helpkonstruaĵo por la semantika analizo de la morfemkonstruaĵoj. La tuta instruo de la vortfarado, prezentita de Kalocsay, ja havas anstataŭ ĉio *praktikan* signifon. Ĝi helpas al la kompreno de la signifo de kunmetitaj vortoj. Ĉi-rilate la reguloj pri vortefiko ne estas tiel maltaŭgaj aŭ naivaj, kiel oni foje volas kredigi. Ili estas nenio alia ol transformaj reguloj, kiuj transformas kunmetitan vorton en sintaksan esprimon. La reguloj pri la rekta kaj inversa vortefikoj celas klarigi la signifrilatojn inter elementoj de la kunmetitaj vortoj. Kalocsay parolas pri "ĉefelemento" kaj "flankelemento". Lingvistoj, tiel ankaŭ Fleischer, tion nomas baza vorto (Grundwort) kaj difinvorto (Bestimmungswort). Ili estas "senperaj konstituantoj" (Unmittelbare Konstituente). Inter ili regas difinaj signifrilatoj, la "sintagmo-internaj semantikaj rilatoj" (Syntagmointerne semantische Beziehungen). Wüster parolis pri "interelementaj rilatoj" (Elementarbeziehungen).

Se ni do akceptas kiel poranalizajn helpkonstruaĵojn la gramatikan karakteron de almenaŭ substantivoj, adjektivoj kaj verbaj radikoj (tamen ne en la troigita formo prezentita en la decido de la Akademio) ni povas bone apliki la transformregulojn de la vortefiko de Kalocsay ankaŭ grandparte al germanaj kunmetaĵoj. Oni devas tamen substreki, ke la regulo nur donas ĝeneralan analizohelpon. Ekzemple 'paperkorbo' ne estas 'korbo el papero' sed 'korbo por papero' kaj papermono ne 'mono por papero' sed 'mono el papero'. La interelementajn semantikajn rilatojn reguligas nia scio pri la objektoj mem kaj ne estas vidigebla por vortefika regulo. Tute absurda ŝajnas al iuj la regulo pri la "inversa vortefiko", do ke la maldekstra konstituento semantike influas la dekstran. Ekz. 'bluokula' laŭ Kalocsay ne estas analizebla kiel 'bluo+ okulo sed nur kiel (blua okulo) + a. Tia analizo por germano ne estas fremda: 'blauäugig' = [blau/es/ Aug/e] + ig. Aldoniĝiŝ vokalŝanĝiĝo ĉe /aug(e) /en/äug/, tielnomata "umlauto".

Tre bone oni ankaŭ povas apliki al germanaj kunmetitaj verboj la trian regulon de la rekta vortefiko kun la 3 subtransformoj:

La verba ĉefelemento efikas al la flankelemento:

- a) adjektivige
- b) adverbige
- c) substantivige

- Por a) satdormi = dormi sata, schwarzstreichen (pentri nigra)²⁾
b) plenkreski = kreski plene, blindschreiben (skribi blinde)
c) pafmurdi = murdi per pafo, radfahren (veturi per biciklo)

Analizo a) kiel montris la apliko de la regulo al germanaj vortaroj, mankis en la verko de Fleischer pri la germana vortfarado. Kvankam tio transformo estas trovebla en la reala lingvaĵo.

Do oni ŝajne havas kaŭzon, verkante sciencan prezenton de la vortfarado de Esperanto, nepre konsideri la ĉefajn trajtojn de la problemo prezentita de Kalocsay.

Detlev BLANKE

(1986)

Literaturo:

- D. Blanke (1982): Plansprache und Nationalsprache. Einige Probleme der Wortbildung des Esperanto und des Deutschen in konfrontativer Darstellung. Linguistische Studien, A Nr. 85, Akademie der Wissenschaften der DDR (Zentralinstitut für Sprachwissenschaft) Berlin, 162 p.
- D. Blanke (1985): Internationale Plansprachen. Ein Einführung. Berlin (Akademie Verlag), 408 p.

1) La lasta eldono aperis meze de la 90-aj jaroj.
2) Ne temas pri tradukoj.

Al D-ro Detlev Blanke

Otto Nagel STR. 110.
D-12683 Berlin

2000.09.22.

Estimata D-ro.

S-ino Ada estas en hospitalo, tial mi korektis la tajperarojn en via artikolo. Bv. kontroli ĝin. Dankon.

Altestime
Ilona Horvath

11.5 LA LINGVISTO KALOCSAY POLEMIKAS

11.5.1 La diskutemo de Kalocsay

Inter la jaroj 1920-1975 apenaŭ troviĝis diskuto en esperantologio sen partopreno de Kalocsay. Pri la diskutemo de Kalocsay trafe skribis K. Piĉ: "...li sin ĵetis ĉien, kie io ne akordiĝis, ĉien, kie li flaris problemojn kaj demandojn..."²⁰²

Vere Kalocsay domaĝis nek penon nek inkon al polemiko, kvankam la diskutantoj plej ofte ne venis al interkonsento.

La diskuto – opiniis Kalocsay – neniam estas senrezulta, ĉar ĝi donas kelkajn pensojn pri grava problemo.

Kalocsay studis ĝisfunde la lingvajn problemojn kaj baze de la esploritaj konstatoj faris konkludojn. Lian diskut-artikolon karakterizas la dinamiko. Li neis kaj jesis, defendis kaj atakis, argumentis per konsekvenca logiko prezentante siajn tezojn ĉiam klare.

Pri la diskutemo de Kalocsay skribis Ferenc Szilágyi: "...tre volonte li eniĝis ĉiam en diskutoj – persone aŭ skribe – pri la plej diversaj problemoj... kaj ĉiam li uzis simpatie kaj kortuŝe delikatan manieron, eĉ kiam li rifuzis la tonon, ne malofte krudan kaj senindulgan de kontraŭuloj, kiujn li klopodis kompreni kaj konvinki..."²⁰³

Vere en la diskuto Kalocsay estis tolerema kaj neniam lekciis superece. Lia ĉi-rilata devizo estis: "*Memoru, ke al la virtoj de la esperantisto apartenas ne nur la obstino, sed ankaŭ la pacienco.*"

En *Literatura Mondo* la rubriko *Disputo* (poste *Diskuto kaj Lingvo*) en ĉiuj tri periodoj de la revuo estis grava konsultejo de la diskutantoj.

Kalocsay kiel disputestro precizigas la vidpunktojn, kiujn konsideru la diskutantoj:

*"Ni deziras havi en tiu ĉi rubriko ne sekajn diskutojn laŭ akademia maniero, sed ŝaŭmante bonhumorajn, viglajn, batalemajn ataketojn kontraŭ ideoj (neniam kontraŭ personoj), ataketojn, kiuj petole mallaŭdas, kun malica rideto grumblas kaj kiuj por argumento prefere uzas la vekon de rido... Venu, disputemuloj! Disputu, grumblu, mallaŭdu. Redisputu, regrumblu, remallaŭdu! Kontraŭdisputu, ataku, sed amuzu. Kaj kiu koleras, tiu jam apriorie ne estos prava."*²⁰⁴

Kvankam la polemikoj havis ankaŭ neutilan flankon, ĉar en la pasia diskuto sonis ankaŭ ofendaj voĉoj (la diskutantoj malatentis la proponitajn vidpunktojn de Kalocsay), tamen oni povas konstati, ke per valoraj studoj riĉiĝis la Esperanta literaturo, kiuj grave akcelis la lingvan evoluon.

202 K. Piĉ: *Kolomano Kalocsay*. En: NLR 6. 1960/61: 36, p. 217-221.

203 F. Szilágyi: *Zigzage en lamujo II*. En: NLR 6. 1961:36, p. 211-215.

204 Disputestro (t. e. K. Kalocsay): *Pri la disputo*. En: LM 1922/68.

11.5.2 Diskuto pri la uzado de apostrofo

La demando pri la uzado de la apostrofo jam en el fruaj jaroj de Esperanto estis pledata en la paĝoj de revuoj, malgraŭ, ke la ĉi-rilata zamenhofa principo estas klara.

Anstataŭgi per apostrofo ellasitan vokalon en Esperanto oni rajtas la A de la artikolo nur post prepozicio, aŭ konjunkcio, kiu finiĝas per vokalo kaj la O de la substantivo.

La apostrofo havis kaj havas kontraŭulojn, en kies okuloj ĝi estas kvazaŭ dorno. Ili opinias, la poetoj uzas ĝin por propra komforto, ĉar ili ne povas estri la ritmon sen ĝia helpo. Laŭ Brendon Clark la elizio *sonas kiel singulto* kaj dum laŭta legado aŭ en konversacio malfaciligas la komprenon, kondukas al kvazaŭdialekto.

En *La arto poetika* de C. E. R. Bumy oni legas:

Kiel poeto, vi ja certa scias,
ke en poemoj oni elizias
la o-finaĵon. Tio estas fakto.
Sed uzi ĝin necesas certa takto.
Do gardu vin, ke pro la apostrofo,
al lango ne okazu katastrofo.
Afabl' kaj tondr' kaj majstr' kaj distr' kaj tiaj,
normalajn langojn igas konvulsiaj.
Do apostrofu sole tian vorton,
kiu ne trudas al la lang' perforton.
Kaj poste, uzu apostrofon rare.
Ne svarmu ili en la vers' elstare,
kaj pike, kiel en la fiŝviando
la etaj ostoj, kiuj dum la frando
minacas ĉiam hoki en la gorĝo.
Ni tudas — ĉesas la agrabla sorĉo.
Ne apostrofu ambaŭ vortojn krude,
kiuj sinsekve trovas sin apude,
nek ambaŭ vortojn de rilat' poseda,
ĉar tio estas troa, sekve teda.
La "sent' de l' kor' ", "trans krad', ĝarden' " — tre ĝenas,
kaj tiaj versoj en la korbon venas.
Do metu, ke vin tia plag' ne punu,
En unu vers' nur apostrofon unu.
Vi ne sukcesos *ĉiam* tiel fari,
sed lernos tiel apostrofon ŝpari.

La apostrofo havas kontraŭulojn,
al kiuj ĝi tre ĝenas la okulojn,
kaj eĉ pli la orelojn. Tiu sekto
parolas grumble pri "komprendifekto".
Ne timu ilin, ili ja ne pravas.
Se viaj versoj ne tro multe havas
el tiuj fiŝostetoj, ili ĉarmas
eĉ tiujn, kiuj kontraŭ ĝi sin armas.
La apostrofo estas avantaĝo,
kies ekstermo estus ja domaĝo.

Pri la ellasitaj apostrofoj ĉe la elizio de la o-finaĵo alvenis riproĉoj:

G. Csüllög (Hungario) skribis:

"Kion Kalocsay provadas, tio estas nepardonebla peko kontraŭ la reguleco la strukturo, la valoraj rekonigiloj de la lingvo. Se al li pli plaĉas komplet- aŭ nul-apostrofado, li reiru al tiaj naciaj kaj internaciaj lingvoj, kiuj ne ligas al li la manojn... Al mi ne plaĉas, ke per mia abona mono mi honorariu pro la diletantista duonapostrofado al Kalocsay, Tárkony, J. Tóth, aŭ kiu ajn."

Sz. Kazimierz opinias:

"La o-finaĵo de la substantivo estas Fundamenta principo, kiun ne licas rompi... Se ni akceptos, ke licas skribi simple *tabl, hom, dom, tiam ni devas forstreki la Fundamentan principon, ke ĉiu substantivo finiĝas je -o...*"

*

Al la malaprobaj leteroj reagis Kalocsay:

*Principe: mi ĉiam alte taksis niajn fortojn konservativajn, kiuj gardas la stabilecon de la lingvo. Sed se ili tro funkcias, ili povas malutili per tio, ke ili malhelpas eĉ etan, supraĵan (kaj bonvenan) poluradon de la lingvo. Anstataŭ tuj kapti klabon, do estu eble pli konsilinde translasi la aferon al la imito aŭ ignoro de la "libera evoluo".*²⁰⁷

Bibliografio.

K. Kalocsay: En: *La arto de la verstraduko*. Prelego dum la 32a UK en Bern, 1947. En: DPr p. 47-48.

K. Kalocsay: *Pri la poetiko de "Malnovaj lampoj"*. Diskuto kun B. Clark. En: LM 1948/180-181.

B. Clark: *Respondo pri "Malnovaj Lampoj"*. En LM 1949/86-88.

K. Kalocsay: *Kara Brendon Clark!* (Respondo). En: LM 1949/88-89.

W. Th. Oeste: *Ankoraŭ pri la elizio*. En: LM 1949/119-120.

K. Kalocsay: *Respondo al W. Th. Oeste*. En: LM 1949/120-122.

B. Clark: *KIEN LA POEZIO?* Rickmansworth: The Esperanto Publishing Co. 1957. 156 p.

P. Thorsen: *Recenzo. Puritano de l' poezio. Kien la poezio?* En: NP 1958:2, p. 118-119.

R. Rossetti: *Recenzo. Kien la poezio?* En: NLR 5. 1958:2, p. 46-49.

S. Engholm: *Recenzo. Kien la poezio?* En: LE 1958:6-7-8, p. 79.

H. Vatré: *Kien la elizio? Letero al Brenda*. En: NLR 6. 1960/61:32, p. 23-27.

K. Kalocsay: *Diskuteto pri la apostrof-ekstermo*. HV 1971:3, p. 12.

205 László Nagy: *Himno en ĉiuj tempoj*; Margit Szécsi: *La ekfloritaj manoj*.

En Hungara Vivo 1969:4, p. 24-25.

206 En: Hungara Vivo 1969:4, p. 25.

207 En: Hungara Vivo 1971:3, p. 12.

Rekomendo al Esperantaj Poetoj

Meritas dankon kaj saluton
Plej nova Kalocsay-surpriz,
Vi prenu tiun absoluton
sen ajna eta kompromis.

Kaj antaŭ ĉio vi, poetoj,
nun skribu nepre laŭ konsil,
sen apostrofoj —"fiŝostetoj" —
laŭ brila Kolomana stil!

Aleksandr LOGVIN

Repr. el Internacia Ĵurnalisto 1972:1, p. 5.

11.5.3 Argumentoj kaj kontraŭargumentoj pri Esperanto

En la jaro 1949 František Trávniček, universitata profesoro de la ĉeĥa lingvo en la universitato en Brno, akre atakadis Esperanton en la ĵurnalo *Lidová noviny* (Popola ĵurnalo). Aparte malice li estis en la artikolo en la eldono kun la dato 2.X.1949, en kiu li interalie trovas Esperanton "konglomerato (kungluaĵo) de elementoj el diversaj lingvoj" kaj parolas pri vaneco de klopodoj krei "artefaritan mondlingvon".

Sekve, ke la redakcio de la ĵurnalo malatentis alparolojn de esperantistoj, mi, kiel sekretario de la *Esperanto-Asocio en Ĉeĥoslovaka Respubliko*, provis transŝovi la diskuton al universitata nivelo. Pro tio mi esperantigis la Trávniček-artikolon kaj sendis ĝin al D-ro K. Kalocsay, al D-ro E. Privat kaj al aliaj eminentuloj kun peto skribi al Trávniček pere de EAĈSR, kiu ĉeĥigos la kontraŭargumentojn. Kalocsay efektive plenumis la peton kaj verkis argumentplenan leteron, kiun mi kun la ĉeĥa tradukteksto sendis al Trávniček. La respondo de Kalocsay estis vere trafa — ĝi estis diskuto de lingvisto al lingvisto. Jen:

Al Prof. D-ro F. Trávniček
Universitato en Brno

Estimata Kamarado!

Oni sendis al mi en esperanta traduko vian artikolon kontraŭ Esperanto. Vi decide rifuzas al tiu lingvo la vivkapablon! Strange estas tamen, ke mi nun respondas Esperante al via artikolo esperantigita. Ni do diskutas inter ni per lingvo, kiu laŭ vi estas mortnaskita, do ne taŭgas por interŝanĝo de opinioj.

Vi volas mortbati Esperanton per la sekvaj argumentoj:

1. Ĝi estas artefarita, do ĝi estigis tiel, kiel neniu lingvo en la mondo.
2. Ĝi estas kunmetita el esprimiloj de diversaj lingvoj, ĝi estas "konglomerato".
3. Ĝi ne havas la naturajn kondiĉojn de kresko kaj evoluo, ĉar ĝiaj uzantoj ne formas homogenan socion, vivas inter malsamaj sociaj cirkonstancoj.

Nu, mi kredas, ke neniu el la supraĵ tri argumentoj estas decida.

ad 1. Vere, Esperanto kreiĝis tiel, kiel neniu alia lingvo.

Sed konkludi el tio ĝian senesperecon estas apriora aserto nepruvebla. Ĉu la homo ne povas konscie simpligi la gramatikon, raciigi la vortaron, kaj ĉu ne estus racie akcepti tian lingvon kiel duan lingvon de ĉiuj?

Por tio bezonas nur rekonii la neceson kaj valoron de tia akcepto: la lernejoj faros la ceteron. "Tio neniam okazis en la mondo" estas certe la plej malforta argumento.

Krome, se ne okazis io *tute tia*, okazis jam io simila. Okazis jam, ke la homoj konscie manipulis pri lingvo. Vi certe scias pri la hungara, estona, finna lingvoreformo. Grupo de lingvistoj kaj literaturistoj riĉigis tiujn lingvojn per novaj vortkreaĵoj, eĉ per novaj sufiksoj. Tio pruvas, se ne pli, almenaŭ tion, ke la lingvo ne estas "noli me tangere", ke oni povas artefare influi ties evoluon.

Poste, Esperanto estas nur *certagrade* artefarita lingvo: Zamenhof faris nur ties trunkon: dek ses regulojn kaj mil kelkajn vortojn. Ĉio cetere kreiĝis dum pli ol 60 jaroj per libera evoluo, kiel en la naturaj lingvoj: lingvistoj kaj verkistoj enkondukis novaĵojn kaj la

esperantistoj decidis pri ties sorto per akcepto aŭ ignoro. Ĝuste al tiu libera evoluo, ke la esperantistoj uzis ĝin por interparolo, korespondado, literaturo, scienco, oni povas danki, ke Esperanto fariĝis vere *vivanta lingvo*, dum aliaj multaj lingvoprojektoj restis projektoj.

Esperanto ne disfalis dum tiu libera evoluo, sed ĝi ellaboriĝis multflanke, do ĝi fakte evoluis. Infano mortnaskita ne evoluas. Kompreneble tiun evoluon oni povas apenaŭ demonstri al iu, kiu ne scias la lingvon. Mi tre ĝojus, se vi decidus okupiĝi pri Esperanto, por ke vi mem vidu la "miraklon": el la homunkulo elkreskis fortplena viro.

La vivkapablon de Esperanto montras ankoraŭ pli klare, ke ĝi restis vivanta inter tre malfavoraj cirkonstancoj: du militoj ĝin paralizis por pluraj jaroj, ĝiaj uzantoj ne estis homogenaj, mankis la sociaj kondiĉoj por ĝia ĝeneraligo. Tiuj malfacilaĵoj klarigas, ke ĝi ne povis definitive venki, sed aliflanke ĝia obstina vivado dum pli ol sesdek jaroj, inter tiaj cirkonstancoj, certe pruvas ĝian grandan vivoforton.

Resumo: Se la tutan socion oni povis racie aranĝi, nepre oni povas tion fari ankaŭ pri unu socia fenomeno: pri la lingvo.

ad 2. Vi diras, ke Esperanto estas konglomerato el diversaj lingvoj kaj "nova maŝino ne estiĝas per nura elekto kaj kunmeto de diversaj partoj el maŝinoj".

Nu, argumento per komparo (do poezia rimedo) pruvas pri manko de raciaj argumentoj. Ĉu vere neniam kreiĝis lingvo per kunmeto de elementoj el preteaj lingvoj aliaj? Vidu la anglan lingvon, en kiu miksiĝas keltaj, anglosaksaj kaj francaj elementoj. Vidu la hungaran, kiu estas miksaĵo el finno-ugraj, turkaj, slavaj lingveroj. Kaj la rusa lingvoscienculo Marr pruvis, ke ĉiuj lingvoj kreiĝis tiel: du aŭ pluraj lingvoj efikis reciproke kaj la rezulto de tiu interefiko estis nova lingvo. Oni povas diri, ke Zamenhof senscie, sed instinkte sekvis tiun Marran-principon, kiam en sian precipe latinidan lingvon li akceptis germanajn kaj slavajn elementojn, kaj kiam li harmonie kunfandis kaj unuigis la aglutinan karakteron de la orientaj lingvoj (en la vortfarado) kun la analiza karaktero de la okcidentaj lingvoj (en la morfologio).

ad 3. Ankaŭ via tria argumento estas facile refutebla.

Kial ne povas evolui lingvo, kies uzantoj vivas sub malsamaj sociaj kondiĉoj? La uzantoj de *ĉiu natura lingvo* ja vivis dum jarcentoj inter malsamaj sociaj cirkonstancoj, apartenis al diversaj klasoj. Vi diras, ke la ĉeĥoj vivis komunece en tute konkretaj cirkonstancoj. Mi tute ne komprenas, kion tio signifas. Espereble ne tion, ke ili vivis en homogena (do senklasa) socio?

Eble vi volas diri, ke la lingvon povas evolui nur nacio, en kiu la homoj havas krom la komuna lingvo komunan teritorion, ekonomion kaj kulturon. Sed tion refutas ĝuste via ekzemplo, tiu de la mezepoka latina lingvo. La latina vivis kaj evoluis dum la mezepoko, kvankam nek la klerikuloj nek la humanistoj havis komunan teritorion, nek ekonomion. Kion ili havis? Laŭ viaj vortoj ili formis *certagrade* unuecan komunekon.

Nu, ĉu oni povas konstati, ke en nia epoko formiĝas tia certagrada unueca komuneco inter la *laboruloj* de la mondo? Kaj se malgranda grupo de *humanistoj* bezonis kaj vivtenis la lingvon, dum ilia komuneco ekzistis, kiel ĝin ne bezonus kaj ne povus vivteni la *laborula internacieco*? Estas certe, ke en la mondo ege vigliĝos la rilatoj, la kontakto inter la diverslandaj popolamasoj. Rimedo de komuniĝo do estos nepre bezonata. Sed ĉu ĝi povas esti natura lingvo? Kiu do el la ekzistantaj, kiam al la nunaj kulturlingvoj (rusa, angla, hispana ktp.) aldoniĝos ankoraŭ la kulturlingvoj de la grandaj vekiĝintaj popoloj (ĉina, hinda, indoneza ktp.).

Estas eble, ke tiuj lingvoj estos duaj lingvoj ĉe la popoloj najbaraj, sed ĉu iu el ili povas esti la dua lingvo de la tuta mondo?

Oni povas imagi, ke tiuj lingvoj pli malpli frue kunfandiĝos, kaj tio rezultiĝos novan

lingvon: la lingvon de la mondo. Sed tia kunfandiĝo estas malrapida afero. Precipe nun, kiam la lingvojn fiksas skribo, la lernejo, la gazetaro, la literaturo. Estas sendube, ke la *urĝa bezono* de la internacia lingvo manifestiĝos multe pli frue, ol tia mondlingvo povas estiĝi spontane. Do la *spontanecon* oni nepre devas anstataŭgi per konscia, racia, plana kreado, oni devas fari la *planlingvon*.

Tion faris Zamenhof. Certe, multe pli frue, ol ĝi estis efektive necesa. Sed la sociaj bezonaĵoj ĝenerale instigas la homajn cerbojn por ideaj solvoj longe antaŭ ties efektiveblo.

Nun la progresema homaro havas antaŭ si grandegajn taskojn, ne mirinde do, ke ĝi ne povas dediĉi sufiĉan atenton al la problemo de la internacia lingvo. Sed mi firme kredas, ke venos la tempo, kiam tiu problemo estos la "sekvonta ĉenero". Kaj la solvo de problemo ne estas imagebla alie ol per planlingvo.

Profetadi pri tio, ĉu tiu planlingvo restos ĉiam la dua lingvo de ĉiuj, aŭ ĝi estos la kerno, ĉirkaŭ kiu formiĝos la unueca lingvo de la mondo — tio ĉi estas troa afero de futuro, ol ke ni povus ĝin serioze pridiskuti.

Mi kredas, se vi objektivite konsideras, kion mi skribis, vi devas rekoni, ke viaj argumentoj tute ne estas tiaj, kiuj "per si mem unubate refutas ĉiujn cititajn aŭ eĉ aliajn eblajn argumentojn por tia lingvo". Ĉu estus troa pretendo esperi, ke post tia rekono vi ne nur ĉesigos vian malamikan sintenon al Esperanto, sed vi fariĝos ties amiko? Mi kredas jes. Tia espero estas bazita sur la fido je via objektiveco, je via sincera serĉo de la vero.

Oktobro 1949.

Kun kamaradaj salutoj
via K. Kalocsay

* * *

15.X.1949.

Al J. Marík
Praha

Kara samideano!

Laŭ via deziro jen mi sendas la respondon je la artikolo de profesoro Trávniček. Mi devas diri – *tion diru al neniu, ke tiu artikolo estas multloke tiel konfuza kaj nenidira, ke ĝi ne tre laŭdas sian aŭtoron.*

Esperante, ke mia respondo faros ian servon al nia afero, eĉ se ne tian, kian mi esperas je la fino de mia respondo (ĉar la profesoro ŝajnas esti ege obstina homo).

Mi salutas vin sincere kaj samideane
via:

K. Kalocsay

P.S. Bonvolu sciigi pri la sorto de mia respondo.
K.

* * *

Prof. Trávniček ne respondis kaj ne menciis la leteron de Kalocsay en la ĵurnalo, poste ankoraŭ iom atakis Esperanton. Sed en la jaro 1955 li akceptis la viziton de s-ano Canko Murgin el Sofio kaj deziris al li sukcesojn en lia poresperanta laboro, kaj aldonis, ke li ne volas malutili al Esperanto.

Jaroslav MARÍK
Praha, 1981

11.6 LINGVO, STILO, FORMO

Studoj de K. Kalocsay
Budapest: Literatura Mondo, 1931.
19 cm, 142 p.

Dua eldono. Represo.
Oosaka: Librejo Pirato, 1963.
17 cm, 142 p.

Tria, parte tralaborita eldono.
Oosaka: Librejo Pirato, 1970.
18 cm, 160 p.

Represita ĉap.: "Sendemandaj respondoj"
Jekaterinburg: Sezonoj, 1992.
20 cm, 28 p.

Klasika esperantologia verko.

Esperanta vortfarado; La evoluo de nia poezia lingvo; Sendemandaj respondoj; La Esperanta rimo; Esperanta elparolo; Pri la Esperanta ritmo; Klasika metriko en Esperanto — estas la pritrakitaj temoj de la libro.

La gvidajn principojn de la artikoloj skizas Kalocsay enkonduke. Pri la unua studo li diras:

"*La Esperanta Vortfarado delonge estas mia "amata ĉevaleto". Ĝi jam aperis plurfoje ĉiam tralaborita, mi esperas, ke nun fine ĝi ricevis sian definitivitan formon...*"²⁰⁸ Tiu ĉi temo ampleksas 41 pagojn.

Pro la longdaŭra kaj impeta polemiko pri la Esperanta vortfarado nia volumo dediĉis apartan ĉapitron al la vortteorio de Kalocsay.

La dua eseo pritraktas la evoluon de la poezia lingvo. Ĉi tiun studon verkis Kalocsay kiel prelegon por la *Somera Universitato* dum la 22a Uk en Oxford 1930. La prelegon anstataŭ Kalocsay voĉlegis K. R. C. Sturmer. Kelkaj el la aŭskultantoj akceptis la prelegon plimalpli indigne ĉar ĝi rompis lancon por la riĉigo de la Esperanta vortprovizo, por la bezono de la poezia lingvaĵo. La studo ne nur trarigardas la evoluon de la stilo, sed ĝi ankaŭ montras la trezorojn kaŝiĝantajn en la lingvo: la mirinda fleksebleco, la zamenhofaj parolturnoj, aromaj esprimoj de la plej eminentaj stilistoj (Grabowski, Kabe) estas tiuj bone uzeblaj rimedoj, kiuj helpas al la artistaj manoj plenflorigi la Esperantan literaturon.

La tria ĉapitro *Sendemandaj respondoj* okupiĝas pri la temoj — kiel diras Kalocsay — plimalpli "pendantaj". Nome: *La difina artikolo; Iu kaj ia; Kvazaŭ; Duoblaj konsonantoj; Konjunktivo; Subjunktivo; Iom pri la vortsekvo; Virinaj nomoj; Ata kaj ita; Kompleksaj verboformoj; Edziĝi, enamiĝi; Mirinda; Kutimi; La De-familio, Ci.* Krom la analizoj kaj klarigoj ekzemploj helpas al lernemuloj.

La studoj *pri La Esperanta rimo* kaj *Pri la Esperanta ritmo* volas pravigi la nepre necesajn licencojn de la poeziaĵo.

Pri la studo *Esperanta elparolo* Kalocsay emfazas enkonduke:

"... mi tute ne volas esti leĝdonanto, nur fiksi la elparol-manieron de la plimulto. Ke ĉi tiu, libere evoluinta prononcado ne estas tiel unuregula, kia oni ĝin dezirus teorie, tio ne estas mia kulpo, sed la kulpo de la libera lingvouzo. Kaj ĉi lastan vane volus perforte ŝanĝi, pli bone do, ĝin simple registri, por almenaŭ akceli ĝian unuecon."

En la lastaj paĝoj de la libro oni legas spritan eltrovaĵon de C. E. R. Bumy: *La mezepoka Esperanto*. Ĝi estas esence humoraĵo, en kiu la aŭtoro "rekonstruas la antaŭhistorian Esperanton".

La esearo estis grandsukcesa. Waringhien perletere gratulis al Kalocsay:

"... Unu el miaj deziroj, estas via elekto al la Akademio, kie via loko estas preparita, kaj via ĉeesto necesega. Viaj lastaj verkoj, inter kiuj *Lingvo, Stilo, Formo* donas al vi plej bonajn merititolojn por tio. Pri tiuj verkoj, mi havas multon por diri, kaj precipe laŭdojn...."²⁰⁹

Mankas indikoj kiom da ekzempleroj aperis el la libro, kiu prezentas la subtilaĵojn de Esperanto. Estas nur certe, ke la unua eldono baldaŭ elĉerpiĝis. En 1936 Kalocsay respondanta al intervjuanto diris inter aliaj: *Pri la plej aĉetita libro demandu la eldoniston. Mi kredas, ke ĝi estas Lingvo, Stilo, Formo.*²¹⁰

"Kio klarigas la eksterordinaran sukceson, kiun ĉi libro rikoltis en Esperantujo? — demandis Lajos Tárkony. Certe la avido, per kiu la esperantistoj sin turnas al rimedoj por perfektigi sin en la lingvo..."²¹¹

Ĉe la dua eldono la ofseta represo ne ebligis ŝanĝon en la teksto, do kelkliniaj notoj indikas, ke dum la pasintaj pli ol 30 jaroj la aŭtoro kompletigis kelkajn demandojn, modifis sian opinion aŭ pritraktis iun temon alimaniere.

La tria kompostita eldono en 1970 ebligis tralabori partojn el la artikoloj. Nome: *la difina artikolo; konjunktivo; de; depost; ekde; ata kaj ita*, kaj *la klasika metriko de Esperanto* modifiĝis. Ĉio alia restis senŝanĝa kaj kiel klasika verko validas ankaŭ hodiaŭ, post multaj jardekoj.

208 Tamen ne ĝi estis la "definitiva formo". Inter la jaroj 1968-1972 Kalocsay tralaboris sian vortteorion kaj prezentis ĝin la 7-an de Majo 1973 en la Grupo Konkordo (Budapest). Estas bonŝanculoj, kiuj aŭskultis tiun prelegon, ĉar Kalocsay neniam plu estis videbla antaŭ Esperanto-publiko. Pri "la amata ĉevaleto" Kalocsay intencis lekcii en sia hejmo. La unua studhorio jam estis fiksitaj: La 10-a de Januaro 1976... sed tiam li kuŝis jam en hospitalo.

209 Datumita la 3-an de Januaro 1932.

210 En: ARGENTA DUOPO p. 33.

211 En: PAĜO p. 82.

11.6.1 Esenca bibliografio

- Behrendt, A.: *Kalocsay: Lingvo, Stilo, Formo*.
LM 1931/178-179.
- Minor, K.: *Kalocsay K.: Lingvo, Stilo, Formo*.
GE 1931:11, p. 170-171.
- Butin, M.: *Lingvo. Stilo, Formo*
HdE 1931:41, ((641), p. 3; 1931:51, p. 4.
- Newell, L. N. M.: *Lingvo, Stilo, Formo*.
TBE 1932:Aprilo, (324), p. 170.
- Siedel, L.: *Lingvo, Stilo, Formo. Studoj*.
Aŭstria Esperantisto 1932:4, p. 39-40.
- Tárkony, L.: *Lingvo, Stilo, Formo*.
PAĜO p. 82-87.
- Grau-Casas, J.: *Lingvo, Stilo, formo*.
KE 1933:Septembro-Oktobro, (198-199), p. 93-94.
- Wels, J. C.: *Lingvo, Stilo, Formo*.
Esperanto 1963/213.
- Duc-Goninaz, M.: *K. Kalocsay: Lingvo, Stilo, Formo*.
HdE 1964:2, (1372), p. 4.
- Auld, W.: *Lingvo, Stilo, Formo*.
TBE 1971, Oktobro, (776), p. 14.
- Golden, B.: *Mankhavaj Lingvaj Respondoj*.
HdE 1993:3, (1870), p. 4.

11.6.1.0 Notoj kaj referencoj

- KONATIĜU... p. 17.
- SKIZO p. 32. Novobilský, V.
- ESk 1951:16, p. 1. Rossetti, R.
- Ĉi-libre p. 3, 24, 32, 41-42, 45, 47, 84-84

11.7 PARNASA GVIDLIBRO

Kiel fariĝi poeto?

K. Kalocsay—G. Waringhien.

Budapest: Literatura Mondo, 1932.
175 p. 19 cm.

Dua eldono.
Reviziita kaj kompletigita de
Kalocsay—Waringhien—R. Bernard.

Warszawa: Pola Esperanto-Asocio en kunlaboro de
Heroldo de Esperanto, 1968.
157 p. 20 cm.

Tria eldono.
Komplete reviziita de G. Waringhien.
Pisa/Madrid: Edistudio/Heroldo de Esperanto, 1984.
208 p. 21 cm.

Ni donas ĉion krom genio

diras Kalocsay en la *Balado*, kiu gajhumore enkondukas la volumon.

La PARNASA GVIDLIBRO estas la unua kompleta granda lernolibro de la Esperanta verstekniko. Ĝi instruas proze kaj verse.

La kvar partoj de la libro ampleksas ĉion bezonatan por versfarado kaj versĝuado:

Skizo de Esperanta Metriko
Arto poetika
Rimaro
Poezia fakvortaro

Kvankam la aŭtoroj emfazas *Ataŭparole*, ke ili ne intencas instrui la poetan metion, tamen la libro estas kvazaŭ *Fundamenta Lernolibro* de la Esperanta verstekniko,

En la unua parto G. Waringhien pritaksas: *akcenton, ritmon, rimon, versojn, strofojn, versformojn, sonharmonion, licencojn* en plej zorga prilaboro, aldonante ekzemplojn de Zamenhof kaj aliaj poetoj. (En la dua eldono la ekzemploj estas substituitaj per aliaj, ĉerpitaj el la ESPERANTA ANTOLOGIO, kaj la bibliografio vicigas novajn verkojn).

Koncerne la pleditan metrikon alvenis kontraŭ-argumentoj. Kalocsay reagante al la riprocoj skribas:

"... *Unue pri la ritmo. Ĉu vi ne vidas, ke ĉi-rilate regas anarkio? Germanoj kaj rusoj tenas sin al la rigida ritma skemo, kiu evidente ne taŭgas al la lingvo, ĉar trudas al ĝi nedigesteblajn inversojn de la vortordo. Latinidoj, precipe katalunoj, male, uzas tute liberan, silabnombran metrikon, kiu same ne konvenas al la lingvo, ĉar estiĝas karambolojn de plenakcentaj silaboj, netoreleblajn pro la peza forto de la Esperanta akcento. Nu, ni faris — per la ĝeneraligo de la ritmaj permesoj uzitaj de Zamenhof — tre komfortan kompromison, kiu perfekte konformiĝas tiel al la frazkonstruo, kiel al la sonkaraktero de la lingvo, kaj ĝuste per ĉi tiu konformeco — mirinde faciligas la metion de*

elegantaj, lingve ne perfortitaj versoj. Oni devas nur akcepti ĉi tiun sistemon, por ne plendi plu pri la netaŭgeco de Esperanto por la poezio. Kaj se oni jam ĝenerale akceptis ĉi tiun sistemon — kion mi forte esperas — ĝi estos la Esperanta metriko, al kiu same povas kaj devas alkitimiĝi, kiel al iu ajn nacilingva metriko..."²¹²

En la dua parto de la libro troviĝas la *Arto poetika*, en kiu C. E. R. Bumy en spritaj versoj donas admonojn kaj konsilojn al poetkandidatoj kaj versemuloj. Jen ĝia *Antaŭparolo*:

*Prezentas nun C. E. R. Bumy
artan instruon sen timem'.
En punktoj pli ol unu-du mi
konsentas kun C. E. R. Bumy.
Ĉar ĝin necesis jam resumi
(Vi devis truon senti mem)
prezentas nun C. E. R. Bumy
artan instruon sen timem'.*

K. Kalocsay.

Ĉi tiu leciono en la plej zorga prilaboro traktas: *temelekton, stilon, epitetojn, komparon, rimaron, rimoplekton, apostrofadon, ritmon, licencon, neologismon*.

Antaŭe la aperigo de la libro — sub titolo *Arto poezia* — oni legas la I-an, II-an kaj VI-an ĉapitrojn en *Literatura Mondo*.²¹³ Kompare al tiuj en la libro Kalocsay faris kelkajn modifojn, krome li ellasis diversloke versojn. Ekzemple el la unua ĉapitro estas ellasita:

*Pendigu via liron sur la muron
Kaj batu laŭtan politiktamburon.*

La VI-a ĉapitro riĉiĝis per kelkaj linioj, ekzemple ĉe la fino de la tria alineo:

*mucida, treti, strebi, grunti, kvari,
koĉero, hordo, farbo kaj konkeri.*

La tria parto estas la *Esperanta rimaro* (kompilita de G.Waringhien kaj en la dua eldono kun kontribuo de R. Bernard). En la 58 p. kunmeto estas listigitaj la plej freŝaj vortoj de la lingvo. La rimaro estas taŭge aranĝita. Ekzemple: *Afekt, Efekt, adjekt, objekt, subjekt, ktp*. Bonega sablono por rimĉasanto.

La famon kaj precipe la misfamon de la libro, kaŭzis ĝia fina parto la *Poezia fakvortaro*. En la unua eldono estas listigitaj 602 vortoj ne troveblaj en la PLENA VORTARO de SAT. Ĉi tiu vortostoko ŝokis la kontraŭneologojn. Ili konsideris la neologismojn kiel la iamajn reform-proponojn kaŭzantan la Ido-skismon.

Multajn ŝokigis la registritaj t.n. "familiaraj vortoj" (ĉ. 20-25), ĉerpitaj el la SEKRETAJ SONETOJ de Peter Peneter.

La *Poezia fakvortaro* en la dua eldono ŝrumpis kvazaŭ zanzo. La *Glosaro* listigas entute 130 vortojn, sekve ke intertempe multaj neologismoj enhejmigis en la lingvo, kaj estis ellasitaj ankaŭ la "maldecaj vortoj"

Apenaŭ troviĝas libro en la Esperanta literaturo tiom ofte menciita laŭde aŭ riproĉe, kiel ĉi tiu verko.

En ESPERANTO en PERSPEKTIVO (p. 72) oni legas:

"Parnasa Gvidlibro de K. Kalocsay kaj G. Waringhien kaj R. Bernard restas la plej bona verko por la teorio kaj praktiko de tradicia poezio en Esperanto."

Sed: *Ankoraŭ neniu plaĉis al ĉiu* — diras la zamenhofa proverbo.

Eble estas interese citi ĉi-rilatajn vortojn de Kalocsay:

"Lastatempe fariĝis preskaŭ modo, ke oni fingromontras la libron Parnasa Gvidlibro kiel ian arkivo de fosilaj reguloj, malhelpantaj la najtigalojn trili. Replike mi havas nur modestan peton al la kritikantoj, ke ili tralegu la libron antaŭ ol ĝin skoldi. Ekzemple oni legu sur la paĝo 86:

*Sed kompreneble, ĉi sistem' metrika
rilatas sole al la form' klasika.
En vers' libera marŝu laŭ volo
kun plej kaprica ritma kapriolo.
Regula brido tie vin ne ĝenas,
la formo tie el enhav' devenas,
la form' interna iĝas form' ekstera,
jen la esenco de la vers' libera.
Sed gardu vin, vi estas minacata,
ke via verso iĝos prozo plata.
Se vi ne estras sur interna formo,
pli bone al vi resti ĉe la normo.*

*Se iu poeto malgraŭ ĉi tio — daŭrigas Kalocsay — sentas sin malhelpata en la libera marŝado, ĉe li troviĝas ia perturbo en la funkciado de la piedoj...*²¹⁴

*

La versa *Antaŭparolo* de PARNASA GVIDLIBRO prave diras:

NI DONAS ĈION, KROM GENIO.

212 En: Literatura Mondo 1932/207-208.

213 En: Literatura Mondo 1931/213; 1932/9; 1932/99-100.

214 En manuskripto de Kalocsay.

11.7.1 Esenca bibliografio

Bennemam, P.: *Kalocsay—Waringhien:La Parnasa Gvidlibro.*

LM 1932/191-192.

Kalocsay, K.: *Letero al s-ro Bennemann koncerne lian recenzon pri "Parnasa Gvidlibro".*

LM 1932/207-208.

Butler, M. C.: *Parnasa Gvidlibro (Kiel fariĝi poeto?).*

TBE 1933: Januaro, (333), p. 8-10

Baghy, J.: *Danĝera vojo.* (Pri la Poezia fakvortaro).

Oomoto 1933: 2-3, 4, 5, 5, 6; represita en: LKr 1933:14, 15, 16.

Ragnarsson, B.: *Parnasa Gvidlibro reeldonita. Meritas sobran atenton.*

Esperanto 1969/68.

Capp, C. D. A.: *Parnasa Gvidlibro.*

TBE 1969:Aprilo-Majo, (754), p. 84.

Auld, W.: *Maturiĝo tra 36 jaroj.*

NP 1969:1, p. 61-62.

Miyamoto masao: *Pri Parnasa Gvidlibro.*

La Movado 1969:Marto, (217), p. 10-12.

Blanke, D.: *Libro por poeziamantoj.*

derE 1969:Novembro-December, p. 12.

Haupenthal, R.: *Parnasa Gvidlibro.*

HdE 1969:5, (1468), p. 4.

Haupenthal, R.: *Rigardo en la metiejon de poeto.*

GER 1969:7-8, p. 79.

Auld, W.: En: *Skizo pri la poezia lingvaĵo.*

HV 1974:3, p. 5-6.

Auld, W.: *Parnasa Gvidlibro.*

En: ENKONDUKO...ĉap. III, p. 43-44.

Goodheir, A.: *Bonveninda reeldono.*

HdE 1985:2, (1741), p. 4.

Rossetti, R.: *Parnasa Gvidlibro.*

BrE 1985:Septembro-Oktobro, (866), p. 77-78.

11.7.1.0 Notoj kaj referencoj

ESk 1951:16, p. 2. Rossetti, R.
ESk 1951:16, p. 4. Foote, A.
SKIZO p. 33. V. Novobilský.
NLR Sesa jaro, 1961:36, 218-219.
TBE 1961:Majo, p. 78. Rossetti, R.
Rivista Italiana di Esperanto, vol. 1. Milano, 1963. p. 18-23. Conterno-
Guglielminetti, C.
NB 1963:Majo, p. Suplemento IV-VI.
GVIDLIBRO II, p. 119.
HdE 1971:8, (1507), p. 1. Auld, W.
KAJ LA CETER' p. 14-15
Esperanto 1969/33; 1979/14. Cool, J. 1984/195.
LA KONTRIBUO p. 14. Hauptenthal, R. 14.
HA/2 p. 836. Auld, W.
NE NUR p. 28. Boulton, M.
Fonto 1998:208, p. 5. Fehér, M.
Ĉi-libre p. 3, 5, 7, 12, 17, 19-21, 51-52, 67

EI PARNASA GVIDLIBRO

Balado

Respondo²¹⁵

fanfaronta pri la grandaj utiloj
de tiu ĉi verko

al Kálmán Kalocsay pri la granda
manko de la libro

Jen estas en ĉi tiu libro
manĝaĵo por la Muza fil'
kun salo, pipro kaj zingibro:
klarig', instruo kaj konsil'
kaj krome rimoj mil kaj mil.
Do ĝin, en sankta skribmanio,
Poeto, uzu ĝin util'!
Ni donas ĉion, krom genio.

Jen, estas la Parnasa gvido
por homo arda je verkad',
por homo manka je timido,
vaganto de la vivopad',
kaj la verkinto de l' balad'.
Akceptu jenan elegion:
Jen la verkista Eldorad'.
Krom la geni', ĝi donas ĉion.

Instruas ni pri ekvilibro
de ritmo kaj sonora stil',
kaj: kiel la konfuza vibro
de l' kor' puriĝas per distil'
al jamb', trokeo aŭ daktil'.
Fluidon nutran al kranio
elĉerpu do kun riĉa spil':
Ni donas ĉion, krom genio.

Jen estas la Parnasa brido:
Ĉirkaŭas monton balustrad',
barilo ĉirkaŭ muza sido.
Fortenas nin la fera krad'.
Do, kie estas la najad'?
Ŝi ja inspiris Horacion,
kaj konis ŝin Alcibiad'.
Najado donas la genion!

Kaj (ĝoju en vi ĉiu fibro,
aŭ nin ataku per paskvil')
jen estas, kun kritika kribro,
neologisma vortkompil'
por poezia asimil'.
Do, vidu, mankas ja nenio
por helpi vin tra malfacil':
Ni donas ĉion, krom genio.

Kaj (tion spertis ja Davido
pro la Bat-Ŝeba adultad')
dum koro batas kun rapido
pro ĝojo, honto aŭ degrad',
konsolas bone la skribad'.
Sed mi envas Vergilion.
Al li ja flustris la driad',
kaj mi neniam spertis tion.

DEDIĈO

KONKLUDO

Princo poeto, al armil'!
Kantu kun larma litanio,
aŭ ĉirpu, kiel gaja gril'!
Ni donas ĉion, krom genio.

Majstro poeta, jen konklud'.
Jen la petita litanio.
Mi scias post profunda stud':
Vi donas ĉion, krom genio.

K. KALOCSAY

Leif Gunnar NORDENSTORM

215 Premio "Eglanterio" en la 24-aj Internaciaj Floraj Ludoj.

11.8 PLENA GRAMATIKO DE ESPERANTO

Vorto kaj frazo.
K. Kalocsay—G. Waringhien.

Unua eldono: Budapeŝto: Literatura Mondo, 1935.
372 p. 22 cm.

Dua tralaborita eldono: Kun detala komentario pri
vorto kaj frazo.
Budapeŝto: Literatura Mondo, 1938. 488 p.

Tria kompletigita eldono: La vorto kaj la frazo.
Milano: Esperanto Propaganda Centro.
1-a kajero 1958. 181 p.
2-a kajero 1964. 187–362 p.

Kvara eldono: **PLENA ANALIZA GRAMATIKO DE ESPERANTO (PAG)**

Tralaborita kaj ampleksigita de G. Waringhien.
Kompostita en Brazilo far *Fonto*,
enpaŝigita kaj fotografita en Nederlando kaj Belgio,
presita kaj lukse bindita en Ĉinio.
Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 1980. 599 p.

Kvina korektita eldono de PAG.
Jubilea kolekto n-ro 2.
Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 1985. 599 p.

ĈEFVERKO PRI LA GRAMATIKO DE ESPERANTO.

Ĉefaj ĉapitroj de la volumo: *Fonetiko, Vortfarado, Morfologio kaj Sinetio, Vortsintakso, Frazsintakso, Propozici-sintakso, Vortordo, Interpunkcio, Indekso*. La libro donas detalan kaj klaran respondon al ĉiuj gramatikaj duboj.

La aŭtoroj dividis inter si la laboron jene: Kalocsay faris la Fonetikon, la Vortfaradon, kaj el la Sintakso la Kompleksan frazon; Waringhien la Morfologion, kaj Sinetion kaj el la Sintakso la Vortsintakson kaj la Propozici-sintakson. Tamen, kiel ili emfazas antaŭparole, ke nur malmultaj pecoj apartenas sole al unu el ili.

En la *Antaŭparolo* oni legas:

"La unua sento, kiu verŝajne atakos la leganton ĉe la ekrigardo al tiu ĉi libro, estos timo, kaj lia unua penso — amara bedaŭro pri la liliputa 16-regula gramatiketo de 1888. Li konsoliĝu pensante, ke ankaŭ li mem ne povus survesti sian unuajaran pantaloneton, kaj de tiu ampleksiĝo de la gramatiko nenion alian signifas krom evoluo kaj kresko de la lingvo. Kaj pri tiu punkto, ni esperas, oni povas nur ĝoji.

La aŭtoroj certe kalkulis la ĝeneralan fobion kontraŭ gramatiko, tial ili sin ekskuzas per pluaj argumentoj, nome, ke al la detala studo de la lingvo kaj doni respondon al ĉiuj etaj

demandoj, estas necese verki iom pli ampleksan libron; krome Esperanton uzas homoj diversnaciaj, influataj de la gepatra lingvo. Do:

"Oni devas kalkuli kun tiuj naciismoj, kribri ilin, akcenti tiujn, kiuj estas ĝenerale uzataj kaj ne tro pikas la logikon, forpuŝi la aliajn — kaj tiun disjuĝon oni ne povas fari sen granda detalado. Tiel oni povas argumenti, ke en nia gramatiko la malfaciloj venas ne de Esperanto mem, sed de la naciaj lingvoj."

Kalocsay kaj Waringhien konsciis, ke "fajrajn karbojn ili kolektas sur sian kapon". Vere, la dika gramatiko (laŭ la ŝvarca spritaĵo KILOGRAMATIKO) elvokis indignojn de la simplistoj. Ili opiniis, ke la verko estas atenco kontraŭ la *Fundamento* kaj ĝia amplekso en si mem refutas la aserton, ke Esperanto estas simpla, facile lernebla lingvo. Ili ne komprenis, ke en la libro estas kritike registrita la zamenhofa lingvouzo, kaj ke tiu ĉi scienca verko estas kreita ne por komencantoj, sed por la progresantoj de Esperanto.

La aŭtoroj de PLENA GRAMATIKO proponis ke la akademianoj, kaj la *Lingva Komitato* esploru la verkon kaj faru pri ĝi siajn rimarkojn. Rollet de l'Isle, prezidanto de la *Lingva Komitato* akceptis la proponon kaj en cirkulero alvokis la anojn de lingvaj institucioj, ke ili partoprenu en ĉi tiu enketo. Vilmos Bleier, la eldonisto sendis ekzempleron al ĉiuj akademianoj, petante ilin pri detala kritiko utiligotan ĉe la dua eldono.

La cirkonstancoj malhelpis, ke la *Akademio* okupiĝu pri la verko tiel funde, kiel la aŭtoroj esperis.

Tamen alvenis kritikoj kaj konsiloj de la zamenhofologo W. Bailey, de Leo Belmont, M. C. Butler, P. Christaller, P. Corret, E. G. Dodge, H. Dresen, E. Drezen, V. Inglada, E. Marcelé, T. Pumpr, M. Rollet de l'Isle, A. Stamatiadis kaj Lidja Zamenhof.

Kelkajn alparolojn komunikis *Lingvo-Libro*, samtempe la aŭtoroj per argumentoj defendis siajn tezojn. En la revuo longe daŭris la diskuto.

Bedaŭrinde — diris poste Kalocsay — ni ne multe profitis de ili. Iliaj riproĉoj plejparte baziĝis sur nekompremo, aŭ miskompremo, aŭ sur la tezo, ke ĉiu regulo katenas la lingvon, do estas forĵetenda. Ili donis al ni okazon larĝe ekspliki la diversajn problemojn, sed la dua eldono de PG apenaŭ estis influita de ili.

Do la aŭtoroj submetis la verkon al detala revizio. Eble estos interesa citi kelkajn kritikojn el la alparoloj tiom pli, ĉar la iama *Lingvo-Libro* hodiaŭ estas apenaŭ akirebla raraĵo. Jen:

"La libro estas sendube valorega helpilo por serioza studanto, kiu penus trapenetri ĉiujn sekretojn de la lingvo. Sed ne metu ĝin en la manojn de <ekesperantisto>, ĉar tiu dika volumo, neniel cedanta al la volumoj de alilingvaj gramatikoj, povus facile igi lin <eksesperantisto>. Montru ĝin al la lingvaj profesoroj, kiuj amas kaj respektas la gramatikegojn. Kaj ankoraŭ — ne montru ĝin al tiuj, kiujn vi konvinkas, ke Esperanto estas la plej simpla lingvo en la mondo. Ili eble dubus tiam la verecon de via aserto..."²¹⁶

*

"...La aŭtoroj de la Plena Gramatiko prenis la flekseblan lingvon de Zamenhof kaj rigidigis ĝin, streĉante ĝin sur la vastan kadron de la Latina gramatiko, malgraŭ la ofte ripetitaj avertoj de Zamenhof: <ni ne devas kateni nin> kaj <ni ne devas peni, ke nia lingvo estu tro preciza>... El ĉio supre skribita vi povas formi opinion pri la ebleco de interkonsento inter mi, Zamenhofa Esperantisto, kaj la aŭtoroj de la Plena Gramatiko. Jam de la unua tempo de la lingvo Rundstedt, de Wahl, Meier, Grabowski, Trompeter, de Saussure, Sentis, Couturat, de Beaufront k. c. ŝiris la lingvon laŭ sia bontrovo; estas jam tempo iri returne al la fonto!"²¹⁷

*

"... Laŭ mia opinio la Akademio ne havas povon oficialigi la tekston de *Plena Gramatiko* (en la parto Vortfarado, kiun mi esploris), eĉ ĝi ne devas rekomendi la verkon al la atento de la esperantistoj... La aŭtoroj forgesis, ke la ĉefa trajto de nia lingvo estas la eksterordinara simpleco kaj ili volis fari lernolibron tiel komplikan kaj subtilan, kiel la lernolibroj de naciaj lingvoj... Estus bedaŭrinde, se tro logikeco malbone gvidita povus konduki nin al nova terura situacio! Tial mi modeste opinias, ke la Akademio devas sin teni flanke de tiaj personaj opinioj, kiuj malgraŭ sia eksterordinara kompetenteco kaj la plej bona intenco povas per siaj reformaj proponoj krei grandan danĝeron al Esperanto..."²¹⁸

*

Feliĉe la aŭtoroj de PG ne ofendiĝis, eltenis ne nur la riproĉojn, sed ankaŭ la akuzojn pri ilia malfideleco al la zamenhofa lingvo. Kalocsay kaj Waringhien pritraktis ĉiun kritikon, ĉiun konsilon, pri la dubaj punktoj ili konsultis kaj preparis la verkon al la dua eldono.

En 1936 intervjuanto faris demandon al Kalocsay:

— Vi faris kun Waringhien tiel ampleksan Plenan Gramatikon, pri kia povus fieri multaj nacioj. Ĉu ne malutilos al la propagando tiu vere "peza" libro anstataŭ la 16 reguloj kaj la 5-gramaj Ĉefeĉ-ŝlosiloj?

— *Mi spertis la malon* — respondis Kalocsay. — *Al kiu ajn mi montris la libron, tiu esprimis sian respekton al la lingvo havanta tian lingvan kondukilon. Cetere, tiuj 16 reguloj neniam sufiĉis. Oni ja ĉiam parolis pri la "spirito de la lingvo", kiujn ĉiu verkisto devas alproprigi. Nu, tiun spiriton ni penis kapti en reguloj kaj alirebligi al ĉiu pli facile, ol per trastudo de ĉiuj Esp-aj verkoj.*²¹⁹

*

En 1938 aperis la dua eldono de la libro, en kies *Antaŭparolo* oni legas:

"La rapida elĉerpiĝo de la unua eldono pruvas, ke la verko plenigis senteblian mankon, kaj ke vasta publiko interesiĝas pri tiaj studoj, dezirante alproprigi la lingvon en ĉiuj detaloj. Tiu interesiĝo kvazaŭ devigis nin pliperfektigi la duan eldonon kun konscienca konsidero de la kritikoj. Se ni malakceptis kelkajn, ni tion faris — oni bonvolu kredi — ne el blinda memestimo, sed el seriozaj motivoj... Oni riproĉis, eĉ akre, pri nia malfideleco al la Zamenhofa lingvo. Nu, sufiĉas trafoliumi la libron por konstati la malon: preskaŭ ĉiun regulon ni ilustris per Z-a ekzemplo; pri ĉiu duba punkto ni konsultis lian lingvouzon. La ĉefa utilo de la verko estas ĝuste, ke ĝi ebligas tuj informiĝi, kiel Z. solvis iun demandon, dum ĝis nun povis tion fari nur post longa relegado de liaj verkoj..."

*

La dua eldono de PG dum la jaroj parte vendiĝis, parte (dum la dua mondmilito) neniĝis; do ĝi ne estis havebla. Stefano La Colla prenis sur sin reeldonon de la libro.

La aŭtoroj kompletigis la verkon, tralaboris kelkajn ĉapitrojn utiligante siajn spertojn pri la uzado de la lingvo kaj profitis ankaŭ el la studoj (intertempe aperintaj) de aliaj gramatikistoj.

La eldonisto pro financaj kaŭzoj decidis presigi la verkon en tri volumoj. Tio bezonis novan aranĝon de la materialo, aliigon la numerojn de la paragrafoj ktp.

En 1958 aperis la I-a kajero, kiu enhavas la ĉapitrojn: *Ortografion, Fonetikon, Morfologion kaj Sinetion*.

La dua kajero povis aperi nur post longa paŭzo en 1964. Ĝi entenas la *Vortsintakson, Propozici-sintakson, Frazsintakson kaj Vortordon*.

La tria kajero estis dediĉita por *Vortfarado kaj Indeksoj*, sed ties apero pro la morto de St. La Colla (1966) ne realiĝis. La tria kompletigita PLENA GRAMATIKO restis stumpa verko, pro kio Kalocsay multe ĉagrenis.

Estas interese kompari la kritikojn de la unua kaj tiun de la tria eldono. Ankaŭ ĉe la ĉi-lastata ne mankis riproĉoj, sed la recenzantoj observis la verkon multe pli sobre, pli objekte ol en 1935. Tamen la recenzo de Teo Jung pri la unua volumo²²⁰ reŝanĝis la diskuton pri la particip-uzado en la pasiva konjugacio vulgare nomata ATA/ITA demando. Komenciĝis longdaŭra kaj akra polemiko, aperis ofendaj batal-skribaĵoj. La konflikto alportis utilon kaj malutilon.²²¹

Ankaŭ la tria eldono de PLENA GRAMATIKO estis jam longe elĉerpita, kaj Kalocsay, unu el la aŭtoro duopo ne vivanta, kiam aperis la kvara eldono sub titolo PLENA ANALIZA GRAMATIKO DE ESPERANTO, familiare nomata PAG. La novan eldonon detale reviziis kaj ampleksigis G. Waringhien. 70-paĝaj *Indekso* kaj *Enhavtabelo* faciligas la retrovon de ĉiu ajn temo.

La kvina korektita eldono de PAG aperis en 1985.

La granda amaso de zamenhofaj ekzemploj pravas, ke la verko, bazita sur la fundamenta tradicio, fidele respegulas la "spiriton" de Esperanto. La detalaj klarigoj, la ekzaktaj difinoj faras la verkon unika en sia speco.

216 En: LL 1936:1, p. 5. Lidja Zamenhof.

217 En: LL 1936:1, p. 10. W. Bailey.

218 En: LL 1936:3, p. 9-10. V. Inglada.

219 En: AD p. 38. L. Halka.

220 En: HdE 1959:9, (1287), p. 1-2.

221 Vd ĉap. 11.3

11.8.1 Esenca bibliografio

- Kalocsay, K.—Waringhien G.: *Antaŭparolo de Plena Gramatiko de Esperanto*.
LL 1935:1, p. 37-38.
- Collinson, W. E.: *Plena Gramatiko de Esperanto. Vorto kaj Frazo*.
LL 1935:3, p. 149.
- Aymonier, C.: *Plena Gramatiko de Esperanto. Vorto kaj frazo*.
FE 1935:Decembro, p.150.
- Zamenhof, Lidja: K. Kalocsay & G. Waringhien: *Plena Gramatiko de Esperanto*.
LL 1936:1, p. 2-5.
- Pik, M. Alice: *Takto; Pionireco*. (Reago al la kritiko de S. Grenkamp-Kornfeld pri la Plena Gramatiko de Esperanto. (En: *Nia Gazeto*).
LL 1936:1, p. 3, 5.
- Belmont, L.: *Omaĝo al sinjoroj Kalocsay kaj Waringhien aŭtoroj de "Plena Gramatiko de Esperanto"*.
LL 1936:1, p. 6-8.
- Bailey, W.: *Por la zamenhofa lingvo*.
LL 1936:1, p. 9-10.
- Inglada, V.: *Rimarkoj pri la parto II. "Vortfarado"*.
LL 1936:2, p. 3-13; daŭrigo: 1936:3, p. 3-10.
- Bailey, W.: *Por la zamenhofa Esperanto II*.
LL 1936:3, p. 2-3.
